


NUMERO 200 (2004:2)

ISSN 0023-3692

# KONTAKTO

**Ĉu laste...  
reaperis?**



Kompletigita  
plena  
ŝercaro  
de *KONTAKTO*



Ho ve! Nia vic-redaktoro ŝajne decidis aliĝi al la ukraina armeo... Kaj oni eĉ akceptis lin!

Foje mi estis en Varsovio kaj, atendante la flugon al Germanio (mi havis kelkajn liberajn horojn), mi iris en la urbon. En la malnova urbo mi ekvidis la montron: "Al la humurmuzeo". "Ho, kia bonŝanco, tion mi nepre devas viziti", – pensis mi, kaj, antaŭguante, tuj direktis min al tiu loko. Atendoplene, mi eniris la muzeon kaj... ho

ve, plena seniluziigo: ĉiuj surskriboj estis nur en la pola, kaj – plej grave – preskaŭ ĉiuj herooj de la karikaturoj estis polaj politikistoj kaj aliaj famuloj, pri kiuj mi, kompreneble, nenion scias... Mi foriris de la muzeo pripensante la internaciecon kaj malinternaciecon de humuro. Ĝuste tiam aperis la ideo pri humura *KONTAKTO* – kaj la rezulton vi nun tenas en la manoj. Alia instigo estis konstantaj ŝerc-interŝanĝoj kun nia vic-redaktoro Joel, kiu nun verŝajne pli ofte citas ukrainajn kaj rusajn ŝercojn ol usonajn.

Ĉiu nacio havas sian humuron, foje kompreneblan nur kondiĉe ke oni konas la historian fonon kaj la nunan situacion de la lando. Sed ŝajnas al mi, ke nuntempe humuro pli kaj pli internaciĝas – plejparte dank' al televido (ni ja ĉiuj estas informataj pri la samaj aferoj) kaj interreto (plej bona rimedo komuniki sian elpensajon al la tuta mondo). Plej ofte ĵus aperintaj internaciaj ŝercoj rilatas al la nuna realeco. Ekzemple, antaŭ kelkaj monatoj en Ukrainio popularis ŝerca demando: "Ĉu vere Usono bezonis militon en Irako? – Nu kompreneble! Kie ĝi povis trovi tiel bonan kaj tute senpagan fonon por siaj mars-esploroj?!"

Do, ĉu eblas humuri internacie? Ĝuste al tiu demando ni provis trovi respondon per tiu ĉi numero (al ĝi cetere kontribuis homoj el Germanio, Nov-Zelando, Israelo, Nederlando, Usono, Francio, Ukrainio, Belgio, Rusio, Serbio, Irano, Hispanio...).

Kio estas humuro kaj kio estas humuro en Esperanto? Sciigas Donald ROGERS (Nov-Zelando), kiu faris grandan esploron ĉi-teman. Daŭrigas la temon intervjuo kun la redaktoro de la reta humurgazeto *Volapüg'* – Henri DE SABATES (Francio). Li rakontas, kiel naskiĝis la volapüg-a aventuro, kaj kial, laŭ li, humuri internacie estas pli malfacile, ol humuri naci-skale.

Kaj jen la ŝerc-torĉon prenas mia samlandano Jefim ZAJDMAN. Li rakontas, kiel li gajnis ŝerc konkurson, rakontante anekdotojn (verajn!) pri si mem.

Ĉu vi scias, kie troviĝas Bervalo? Nu kompreneble en Esperantio! La lokajn (t.e. tute bervalajn) ŝercojn rakontas Richard CASH, Francio. Kaj jen mildan humuron ŝanĝas iom satira rakonto de Lode, Belgio, kaj poste – de Marco TREVISAN HERRAZ, Italio/Hispanio.

Kiel oni festas la unuan de aprilo en la plej humura urbo de la tuta eks-Sovetio – Odeso – informas Olga GRIBOVAN, Ukrainio. Kaj sekvas ŝin artikolo pri iom nekutima "unua de aprilo" festata... en decembro! Pri tio denove rakontas Marco TREVISAN HERRAZ.

Tio kompreneble ne estas ĉio! Ĉi-numere atendas vin amaso da aliaj ŝercaj rakontoj kaj anekdotoj. Plus – tiu ĉi numero havas kvarfolian aldonajon – KAKTON, kun la temo Interkulturo. Ĝuu, ŝercu kaj interkulturu kun *KONTAKTO*. Bonan legadon!

*Ĵenja*

Sur la kovrilo: I. ONEȚ (Rumanio/Usono/Nederlando), la libroservisto de UEA, kaj L. L. ZAMENHOF (Rusa Imperio/Pollando/Spirita Mondo), la kreinto de Esperanto. Kun afabla permeso de ambaŭ, kaj ankaŭ de la fotisto – Ziko Marcus SIKOSEK, Germanio/Nederlando.

Humuro en Esperanto (Donald ROGERS, Nov-Zelando).....	3-5
Ŝerca vortaro.....	3-4
Ŝercoj el sud-orienta Usono (Joel AMIS, Usono/Nederlando) 5	
“Humuri internacie estas ege pli malfacile ol humuri naci-skale...” (intervjuo kun Henri DE SABATES, Francio) .....	6-7
Nomoj en diversaj kulturoj (Slavik IVANOV, Rusio) .....	7
Kiel mi gajnis en konkurso de anekdotoj (Jefim ZAJDMAN, Ukrainio).....	8
Bervalo – la vera Esperantujo, aŭ: Serĉu la ŝercon! (Richard CASH, Francio).....	9
La mirindaj aventuroj de O (Lode, Belgio).....	10
Benjamin FRANKLIN: saĝe kaj sprite (trad. Morteza MIRBAGHIAN, Irano/Usono).....	10
Unue estis la bito... (trad. Marco TREVISAN HERRAZ, Italio/Hispanio).....	11
Komputilaj ŝercoj	11
Odesaj ridetoj (Olga GRIBOVAN, Ukrainio).....	12
Sanktaj Senkulpuloj, aŭ: La unua aprilo en decembro (Marco TREVISAN HERRAZ, Italio/Hispanio).....	12
Nia reklamaĉo.....	12
Tra kelkaj urboj de Norda Frankonio (Yenovk LAZIAN, Francio).....	13
Recenze: Ambicia, ĝuinda, altnivele literatura (Mauro NERVI, Italio).....	14

KAKTO: Interkulturo	
Nia urbo: Beogrado.....	1
Ĉuvaŝa nupta festo.....	1
Interkulturo: intervjuo kun Radojica PETROVIĆ kaj Katja IGNATJEVA.....	2-3
Kio estas por vi Interkulturo? (intervjuoj kun partoprenantoj en la projekto).....	4

Humuro estas seriozeco kaŝita malantaŭ la ŝercoj (D. WEISS). Humuro estas talento spontane ekhavi bonan humoron (I. KANT). La kaŝfonto de humuro estas ne en ĝojo, sed en malĝojo: en la ĉielo ne estas humuro (M. TWAIN). Humuro estas savflosilo sur la ondoj de la vivo (W. RAABE). Humuristo tuj rimarkas ĉarlatanon, sed ne ĉiam rekonas sanktulon. Sed eĉ se unuflanka rigardo al la homoj estas multtekosta pago por la humursento, ĝi tamen havas la valoran flankon. Kiam oni ridas pri homoj, oni ne koleras. Humuro instruas toleremon... Humuristo ne predikas, por li plej gravas kompreni; kaj ja ne vane oni diras, ke kompreni signifas kompati kaj pardoni (S. MAUGHAM).

### Temoj de la venontaj numeroj de *KONTAKTO*:

- 201 (2004:3): **DISKRIMINACIO** – rasa, seksa, religia kaj aliaj formoj de diskriminacio. Ĉu ekzistas diskriminacio en via lando? Sciigu tion al la mondo!
  - 202 (2004:4): **LUDOJ** (historio de diversaj ludoj, ekzemple, ŝakoj; modernaj ludoj, interkulturaj ludoj). Limdato: la 5a de junio.
  - 203 (2004:5): **RIFUĜINTOJ/HOMAJ RAJTOJ/TOTALISMO/DIKTATORECOJ**. Limdato: la 1a de aŭgusto.
  - 204 (2004:6): **TERORO/TERORISMO** (inkluzive de hejma teroro/perforto). Limdato: la 1a de oktobro.
- Ni ankoraŭ ne planis konkrete aliajn temajn numerojn. Skribu – tiu decido povas esti ja la VIA. Inter eblaj temoj estas la jenaj: **MANĜAĴOJ** (kial normalaĵoj en iuj landoj estas ŝokaj en la aliaj?); **POLITIKO** (diversaj politikaj ideoj kaj ideologioj, avantaĝoj kaj problemoj de demokratio, kapitalismo/socialismo k.s.); **MILITOJ** (historia aspekto, nuntempaj militoj); **TUTMONDIĜO**; **SEKTOJ** (kio estas “sekto”? kie estas la diferenco inter religio kaj sekto? kiel sektoj “kaptas” siajn viktimojn? ĉu malfacilas eskapi de sekto? kio ĝenerale allogas homojn en sektojn?); **TOLEREMO KAJ SOLIDARECO**. Krome, ekde tiu ĉi jaro *KONTAKTO* ekkunlaboras pri la projekto *Interkulturo* <www.interkulturo.net>. Kune kun la IK-teamo, *KONTAKTO* preparos artikolojn rilatajn al kultura diverseco, interkultura lernado, interkulturaj konfliktoj ktp. Viaj artikoloj / ideoj ĉi-temaj kaj ajnatemaj estas pli ol bonvenaj!

\* Noto: se vi interesiĝas pri la temo, kies limdato jam pasis, sendu vian artikolon ĉiuokaze – ĝi simple estos publikigita en posta numero.

# Humuro en Esperanto

Donald ROGERS, Nov-Zelando

## Kio estas humuro?

Iuj pensuloj provis analizi humuron. Ili diris, ke humuro estas speco de stimulo, kiu emas atingi la ridrefleksion. Ĝenerale, humuro igas la aŭskultanton percepti la situacion en du (aŭ pli) mem-konsekvencaj, sed neakordaj referencokadroj samtempe. Kaj la kreado de subtila ŝerco, kaj la rekreada ago percepti la ŝercon enhavas la ĝojigan mensan ŝoketon de subita salto de unu kuntaksto al alia. Komikisto provas krei streĉitecon ĉe la aŭskultantoj, kiu kreskas dum la rakonto progresas. Ĝi neniam atingas kulminon. La frapfrazo haltigas la logikan evoluigon de la rakonto. Ĝi senblagigas (vidu la suban vortareton – Red.) la dramecan atendon. La streĉiteco liberigas kiel ridado.

Inter geamikoj: “Mi aŭdis, ke ĉiu kvara homo suferas pro mensaj perturboj. Miaj tri geamikoj estas tute sanaj. Ĉu mi nun konsultu kuraciston?” [Monato sept. 2000, p. 26]

## Specoj de humuro

Multaj homoj opinias, ke kalemburo estas la plej malalta speco de humuro. Eble ĝi estas la plej primitiva. Ĝi dependas de la simileco de la sono de du esprimoj. Tamen ankaŭ aliaj specoj de humuro dependas de sono. Komikaj poemoj prosperas pro la melodia unuiĝo de nekongruaĵoj, ekzemple la “Brasikoj kaj reĝoj” de Lewis CARROLL [ljuis kerol], kaj la kontrasto inter nobla formo kaj la bagatela enhavo.

Sensenca poemo atingas komikan efikon per la ŝajno havi sencon, igante la leganton imagi sencon en la fonetika formo. Mi trovis tri tradukojn de *Jabberwocky* [ĝaberuoki] de Lewis CARROLL en Esperanton. Jen la unuaj du strofoj de tiu de Marjorie BOULTON, *La Ŝargonbesto*:

“Brilumis, kaj la ŝlirtaj melfoj en la iejo ĝiris, ŝraŭis; mizaris la maldikdudelfoj, forfuraj ratjoj vaŭis.

Evitu, filo, Ŝargonbeston!  
– Ungoj kaj buŝ’por mord’ kaj kapt’!

Evitu bombonbirdan neston!  
Vin gardu kontraŭ Bendorapt’!”

Satiro estas vorta karikaturo, intence distordita bildo de homo aŭ societo.

Ne ĉia humuro estas komika por ĉiu homo, precipe en la nuna epoko de “politika ĝusteco”. Foje ŝerco ne stimulas eĉ rideton; foje – eĉ naŭzon.

Ĉe floristo: “Ĉu vi havas karnovorajn\* plantojn?” – “Certe. Kiom grandan vi deziras?” – “Hm, ĝi estas donaco al mia bopatrino, kiu pezas ĉirkaŭ 85 kilogramojn”. [Monato sept. 2000, p. 26]

En la nuna epoko estas malfacile ŝerci sen ofendi iun ajn. Multaj evitas ŝercojn pri diversaj rasoj aŭ grupoj. Tiaj estis popularaj antaŭ unu generacio. Ekzemple Nov-Zelanda aŭtoro Tom SCOTT, krom ridindigi politikistojn (kaj tio estas licaĵo\*\*, ĉu ne?), ankaŭ amuze rakontas ŝajne hontindajn aferojn pri si mem kaj sia familio. Sendube li troigas, sed tio estas la arto de rakontado. Multaj ŝercoj estas nur por mal-

pruduloj. Oni devas atenti pri la enhavo de ŝercoj por ne ofendi.

Vilĉjo diris al mi, ke li rimarkis diversajn reagojn al ŝercoj. Norvegoj ĝenerale ridas trifoje pri ŝercoj: unue kiam oni rakontas la ŝercon, due kiam oni klarigas la ŝercon, kaj trie kiam ili komprenas ĝin. Aliflanke, Germanoj ridas nur dufoje: unue kiam ili aŭdas la ŝercon, kaj due kiam oni klarigas ĝin. Ili neniam komprenas ĝin. Usonanoj tamen ridas nur unufoje: kiam oni rakontas la ŝercon. Ili ne permesas ke iu klarigu la ŝercon al ili.

Ekzistas tri medioj de humuro:

1. komedio (en filmoj kaj aktorado sur scenejo, humura mimado).
2. karikaturo (amuzaj desegnaĵoj).
3. lingva (parola kaj presita) ŝercado.

En ĉi tiu artikolo nur la tria estas pridiskutata.

## Specoj de ŝercado

En sia artikolo pri Esperanta humuro David JORDAN distingas kvar specojn de ŝercado:

1. lingvosendependa.
  2. lingvodepnda.
  3. kulturodepnda.
  4. interlingva
- Por esti sendepnda kaj de lingvo, kaj de kulturo, oni ĝenerale devas uzi internaciajn unuojn (metran sistemon), eviti aludojn al klasika mitologio kaj citaĵojn en aliaj lingvoj, ĉar la aŭdanto/leganto ofte ne havas la



## ŜERCA VORTARO

**aĉ-eti** – kondukti iom maldece

**aven-turo** – alta ejo por konservado de porĉevala nutraĵo

**bal-eno** – interno de amuzejo

**barb-aro** – grupo da barbuloj

**biblio-filo** – Evangelio [Nova Testamento]

**ĉam-pano** – nutraĵo bakita el antilopa ledo (ĉamo – antilopo)

**ĉe-valo** – situanta inter montoj

**di-amanto** – fervora kredanto je Dio

**fak-iro** – promeno de spertulo

**fak-turo** – ne oblikva, kiel tiu de Pizo

**fen-estro** – respondeculo pri varmaj ventblovoj en Svisio (feno – alpa varma vento)

**fol-io** – lando de frenezuloj (fola – gaje freneza)

**in-sekto** – sekto, kien oni enlasas nur inojn

**Ir-lando** – lando sen transportiloj

**jug-lando** – lando regata de tirano

**kame-leono** – leono skulptita el gemo (kameo – gemo reliefe skulptita)

**kar-ismo** – emo al prez-altigo

**kav-aliro** – loko, kiu kondukas arkeologojn al la kavo

**kol-oro** – ornamaĵo inter la kapo kaj ŝultroj

**kon-domo** – interkonatiĝa hejmo

**lamp-iro** – procesio kun lampoj (lampiro – lumanta insekto)

**lan-gusto** – pri tio oni povas enketi nur satan lupon



**lup-ago** – leporo pri tio muulte scias

**mis-tero** – fuŝo de paraŝutisto

**mon-golo** – golo enlasita de subaĉetita futbalisto

**mono-teisto** – salajro de profesia te-vendisto

**mus-kato** – mutaciulo el Ĉernobil (sur la bildo estas celita muskat-vino – speco de fama krimea vino)

**mus-tango** – danco de ronguloj

**par-fumo** – geedzoj fumantaj

**par-tero** – geedza tomba

**rip-aro** – parto de skeleto

**rom-ano** – loĝanto de la itala ĉefurbo

**sat-elito** – aristokrato neniam spertinta nutrajmankon

**skot-ero** – korpoparto de Edinburga civitano (skotero – speco de motorcirklo)

**tro-pika** – kakto kun rozo sur ĝi

**turisto** – la plej fama, verŝajne, estas Ejfelo

**tur-kiso** – am-ago en mallarĝa, alta konstruaĵo

(Grandparte) Teddy

LOWENKOPF, Israelo (sendis Josef ŜEMER, Israelo), kaj Ĵenja ZVEREVA, Ukrainio

Kiu fero estas varmega? – la **in-fero**

Kiu strato estas nur en urboj? – la **magi-strato**

Kiu urbo ne estas loĝebla? – la **kuk-urbo**

Kiu vero mortigas? – la **revol-vero**

Wil VAN GANSWIJK, peris Aleks KADAR, Francio

saman edukon aŭ kulturan fonon. Oni povas argumenti, ke kulturosendependa ŝerco ne ekzistas.

*Mi ne havas bonan solvon, sed mi admiras vian problemon.* [Esperanto sub la Suda Kruco 49, p. 16]

Se ekzistus socio, kie oni ne emas paroli pri problemoj kaj solvoj, oni ne komprenus tion.

JORDAN skribis, ke ekzistas limigoj de humuro en Esperanto. Unue, ĉar Esperanto estas uzata de tre diversaj homoj, oni devas atenti, ĉu la kultura kunteksto de la ŝerco estas tradukebla.

Due, la plejmulto da Esperantistoj parolas ĝin neperfekte. Tial oni utiligas simplajn ŝercojn, kiuj ne ridigis en aliaj lingvoj. Spertaj parolantoj ĝuas envolvitajn ŝercojn, ĉar tio montras ilian mastradon de la lingvo.

Trie, la esperantistaro havas kunajn spertojn, kiujn “malsamideanoj” ne spertis. Tiuj spertoj provizas temojn por enaj ŝercoj.

#### Lingvosendependa ŝercado

Tiu baziĝas sur la enhavo de la ŝerco kaj estas tradukebla de unu lingvo al alia. Eĉ en *Fundamenta Krestomatio* ZAMENHOF citis multajn tiuepokajn anekdotojn, ekzemple:

A: “Kial Hanibalo iris trans la Alpoj?” – “Ĉar tiam la tunelo ne estis ankoraŭ preta”.

Tiu ŝerco estas kulturodependa, ĉar oni devas scii iomete pri la historio de Hanibalo.

En la lernolibro de RICHARDSON (p. 284):

*En la kazerno. La soldato plendis, ke en la supo estis sablo kaj tero. Nun li staras antaŭ la komandanto. “Vi plendis pri la manĝaĵoj, ĉu ne? Ĉu vi estas en la armeo por frandi aŭ por servi vian patrujon?” – “Jes, komandanto, por servi ĝin, sed ne por manĝi ĝin”.*

Butler metis multajn simplajn ŝercojn en sian lernolibron, ekzemple:

*Edzino: “Imagu, Henriko! La horloĝo falis de la muro. Se tio estus okazinta unu minuton antaŭe, ĝi frapus mian patri-non!” Edzo: “Mi ĉiam diris, ke la horloĝo malfruas”. [BUTLER: p. 213]*

*“Vi estas tre malgaja!” – “Jes. Mi perdis la okulvitrojn; kaj mi ne povos ilin serĉi, ĝis mi trovos ilin”. [BUTLER: p. 142]*

*“Oksigenon oni eltrovis antaŭ nur cent jaroj. Sen oksigeno neniu povas vivi”. – “Nu, kiel oni vivis, antaŭ ol ĝi eltroviĝis?” [BUTLER: p. 185]*

*“Ankaŭ tio estas libereco: laboregi kiel sklavo – se mi volas”. [R SCHWARTZ]*

#### Lingvodependa ŝercado

Tiu speco utiligas specialajn ecojn de sia origina lingvo kaj estas malfacile traduki ĝin al alia lingvo. Ekzemplo en la angla estas pluraligi la vorton “spouse” (geedzo) al “spice” (spico). Eĉ se la cellingvo havas ekvivalentojn de tiuj du vortoj, estas neeble, ke la dua havas la sencon de “spico”.

Ekzemploj en Esperanto (vidu apude – Red.):

*“Ĉu vi havas bastonon?” – “Ne, mi ne havas bas-tonon: mia voĉo estas baritona”.*

*“Li estas amiko intima” – “Sed kial li timas inon?” [BUTLER: p. 63]*

*“Per kiu litero oni faras juvelon?” – “Per L.” (perlo)!*

*“Kial vi amas tiun kantiston?” – “Ĉar li estas ĉarma persono” (per sono)! [BUTLER: p. 128]*

Lingvodependa ŝercado estas la plej interesa. La plej fama Esperanta verkisto en tiu genro estas Raymond SCHWARTZ. Li estis majstro de la mistranĉo de vortoj por fari surprizajn kalem-burojn. Tiu estas ofta ilo por

lingvodependa humuro en Esperanto.

William AULD recenzis la verkon de SCHWARTZ tiel: “gravas la kaŝitaj signifoj, kiujn la Verda Klaŭno (se vi pardonas tiun epiteton, aŭ epitegon) sukcesis elmini el ili”.

Jen unu el la limerikoj *Duoncento da Fraŭlinoj*, kiujn verkis SCHWARTZ:

*Jen estis fraŭlino en Havro,*

*Simila al seka kadavro,*

*Ĉar pro la prestiĝo de netrodikiĝo*

*Ŝi nutris sin nur per vinagro.*

Tiu limeriko ankoraŭ estas aktuala en ĉi tiu epoko de maldikigaj dietoj. Kelkaj el la aliaj estas malprudaj.

La ampleksaj rimedoj en Esperanto por vortformado donas grandan terenon por novaj ŝercoj. “*Savu malsamideanojn!*”

#### Kulturodependa ŝercado

Ŝercoj, kiuj dependas de kulturo, ofte ankaŭ dependas de lingvo. Ekzemple: paroli pri lokaj eventoj, politikistoj ktp. Preskaŭ ĉiuj ŝercoj kaj rakontoj dependas almenaŭ iomete de kulturo.

Ni konsideru ankaŭ la ŝercojn, kiuj dependas de la kulturo de Esperantujo mem. Oni povas supozi, ke aŭskultantoj kaj legantoj jam aŭdis pri ZAMENHOF, Raymond SCHWARTZ kaj aliaj eminentaj aŭ lokaj esperantistoj. JORDAN nomis ŝercojn pri tiaj homoj angle *in-jokes* – en-ŝercoj. Ĉu ni nomu ilin “samideanaj ŝercoj”? Li menciis, ke oni laŭdis la verkon *Streĉ eĉ, Steĉj-skeĉ* de Stefan MACGILL, ĉar ĝi postulas larĝan scion pri Esperanta kulturo. JORDAN havas en la reto la propran kontribuon – rakontojn, kiuj komenciĝas laŭ la tradicia komenco de tiaj fabeloj: “*Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo, kaj kiam estis gigan-*



toj en Azio... en Esperantujo...” Eĉ terminoj tutmonde konataj tra Esperantujo, ekzemple “krokodili” kaj “kabei”, suferas en tradukado, same kiel ĉiuj samideanaj ŝercoj. Tamen ili ekzistas, ĉar ili kuraĝigas senton de membreco al la Esperantistaro.

En Interreto mi rimarkis ĉi tiun spontanegan respondon al demando:

“Alia demando de vi iras jene: diru al ni, kiaj estas viaj Esperanto-fortecoj kaj Esperantomalfortecoj”. – “Mia forteco estas, ke mi legis la Plenan Analizan Gramatikon de Esperanto skribitan de KALOCSAY kaj WARINGHIEN, de kovrilo al kovrilo [nenia ŝerco ĉi-tie], kaj mia malforteco, ke mi forgesis la plejparton de tiu ilo!” Leo Claude MERCIER al reta diskut-grupo GNU/LI.

### Interlingva ŝercado

Tiu speco okazas per interago de unu lingvo kun aliaj lingvoj. Ĝi ofte okazas en lingvolernado, sed ne estas tre amuza ĝenerale. Ekzemplo estas la ŝercoj de anglalingvanoj pri la saluto: “Kiel vi fartas?” (*fart* en la angla signifas “furzi”). Ankaŭ ekzistas laŭliteraj tradukoj de nacilingvaj idiotismoj, ekzemple: “Li havigas al si mian kapron”.

Jen unu mia kontribuo al ĉi tiu genro, vortludo kiu dependas de angla signifo: “La suno ŝajnas brila” (*the sun shines bright*).

### Terminoj pri humuro en Esperanto

**amuzi** (el la franca *amuser* ← *muser* – “gapvagi”; *museau* – “muzelo”) – agrable kaj gajige distri.

**blago** (el la franca *blague* “tabaksaketo” ← nederlanda *balg* – “balgo”, hindeŭropa *bhelgh* – “enblovi”) – ŝerca mensogo.

**burlaska** (el la itala *burlésco*, ← *burla* – “ŝerco”) – ekstravagance komika, kontrastiganta la noblecon de la temo kun la trivialeco de la stilo, aŭ male.

**farso** (el la franca *farce* – “farĉo” [enmetita en seriozan teatraĵon kiel farĉaĵo en kokiĉon]) – teatraĵo, kies celo estas ridigi per simplaj maldelikataj rimedoj, karikaturo gestado,

krudaj ŝercoj ktp.

**humuro** (el la malnova franca *humeur*) – originala sentomaniero kaj esprimprocedo, kiu kontraŭas al la kutimaj rilatoj inter la aferoj kaj la tono, en kiu oni ilin diras, kiu prezentas la komikaĵojn kun seriozeco kaj la absurdaĵojn kun respekta soleneco, kiu provas komuniki emocion ŝajnigante, ke oni eĉ ne scias pri ĝia ekzisto.

**kalemburo** (el la franca *calembour*, ← *calem* “?” + *bourde* – “stulta eraro”) – vortluda mistranĉo.

**karikaturo** (el la franca *caricature*, ← *caricatura* ← *caricare* – “ŝarĝi”) – desegnaĵo, pentraĵo, prezentanta personon aŭ objekton, kun komika aŭ satira troigo de ties karakterizaj trajtoj.

**klaŭno** (el la angla *clown* [klaŭn] – “plumpa kamparano” latina *colonus* ← *colere* – “kultivi”) – cirka burleskulo.

**komedio** (el la latina *comædia* ← greka “kantato ĉe la Dionizaj festoj”) – teatraĵo, kiu ekscitas la ridon, prezentante komikajn personojn aŭ amuzajn eksterordinarajn cirkonstancojn.

**komika** (la sama radiko, kiel supre) – ridiga, amuza.

**kontraŭknapo** (el la latina *contrâ* – “apartenanta al du kune” kaj la germana *knallen* – “eksoni”) – ŝerco, konsistanta en la inversigo de literoj aŭ silaboj inter du vortoj de frazo (ekz. “labori fiŝe kaj muse” anstataŭ “fuŝe kaj mise”).

**mistranĉo** – speco de vortludo inter du vortoj, identaj por la orelo, sed malsamaj el la vortara vidpunkto (ekz. kuraĝo kaj kuraĝo; pie-diranto kaj piediranto) = kalemburo.

**petoli** (el la latina *petulans* – “atakema, senbrida, petola”) – agadi ŝerce, sendiscipline,

senkonsidere, kontraŭ la reguloj de bonkonduto.

**pintumo** – spritaĵo, pikanta per la proksimigo de du tre malsamaj ideoj.

**proksimumo** – speco de vortludo, en kiu la du priludataj vortoj estas nur proksimume similaj unu al la alia (ekz. SCHWARTZ: “neniu rozo sen dorno, neniu prozo sen dormo!”)

**satiro** (el la latina *satira* ← *satis* – “sufiĉe”) – uzo de ridindigo, parole aŭ skribe, por elmontri kaj senkuraĝigi modon, moron, hommankojn k.s.

**sencoturno** – speco de vortludo, en kiu oni uzas unu saman vorton en du malsamaj signifoj.

**sonalturno** – ludo inter du vortoj, kies fonetikaj elementoj estas ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj, la samaj, sed ne aranĝitaj en la sama ordo (ekz. “fokstroto” kaj “koksfroto”).

**sprita** (el la franca *esprit* ← latina *spiritus* – “spirito”) – posedanta spiritan vigecon, kiu ebligas rapide trovi kaj originale esprimi neatenditan rilaton inter malsamaj objektoj aŭ malsamaj vortoj, ekzemple VOLTERO, SCHWARTZ.

**ŝerco** (el la germana *scherzen*) – tio, kio estas farita aŭ dirita por ridigi.

**trompŝerco** – situacia ŝerco.

**vortludo** – kombino de vortoj similonaj, sed malsamsignifaj, per kiuj oni atingas ridigan efektan.

**vort-tordo** = kontraŭknapo.

Kun afabla permeso de *Esperanto sub la Suda Kruco* (septembro-oktobro 2001), kun mallongigoj, etaj ŝanĝoj kaj aldono de de etimologia parto al la “vortaro”. La difinoj en la vortaro estas grandparte prenitaj el NPIV, etimologio – de *Konciza etimologia vortaro* de André CHERPILLOD

\* karnovora – manĝanta viandon; ursoj, lupoj ktp. estas karnovoruloj  
\*\* lica – permesata

## Ŝercoj el sud-orienta Usono

Joel AMIS, Usono/Nederlando

En la usona Sud-oriento ekzistas du ĉefaj religiaj konfesioj: baptistoj kaj metodistoj (ambaŭ protestantaj konfesioj, kiuj ne multege diferencas inter si). La baptistoj tamen estas ĝenerale pli fundamentismaj, puritanismaj kaj abstinemaj (multaj el ili neniam trinkas alkoholon, kaj la ceteraj ŝajnigas tiel...). Pro tiu ilia reputacio estiĝis la jena ŝerco: “Kio estas la diferenco inter baptisto kaj metodisto? – Metodistoj reciproke salutas, kiam ili renkontas unu la alian en la alkoholvendejoj!”

Atlanto jam de longe estas konata kiel transportcentro – ĝi estis fondita kiel la fervoja centro de la sud-oriento kaj nun ĝia flughaveno estas unu el la plej grandaj en la mondo. Iam oni demandis al maljuna suda kamparano la jenon: “Do, ĉu vi supozas ke post la morto vi iros al paradizo aŭ infero?” La maljuna kamparano iom pripensis kaj respondis: “Mi verdire ne certas, kien mi iros... mi scias nur ke mi ja devos ŝanĝi trajnojn en Atlanto”.

Homoj el aliaj partoj de Usono ofte ŝatas primoki sudanojn. Sed eĉ inter si sudanoj foje mokas unu la alian. Sed ja ekzistas vico, aŭ eĉ hierarkio, de aroganteco kaj malestimo – kaj tiu vico ĝenerale komenciĝas je Virginio kaj progresas sud-okcidenten. Do, virginianoj malestimas nord-karolinanojn, kiuj laŭvice malestimas sud-karolinanojn (kaj eble eventuale tenesianojn), kiuj laŭvice malestimas georgianojn, kiuj siavice malestimas alabamanojn (mi devenas de Georgio do mi bone scias, kiom senkompate georgianoj primokas alabamanojn!), kiuj laŭvice malestimas misisipianojn! La deveno de tiu vico estas verŝajne parte historia kaj ekonomia: Virginio estas ja la plej malnova el tiuj ŝtatoj, kaj Misisipio estas la plej malriĉa – la aliaj kuŝas ie inter la du.

P.S. La verkinto estas ja denaska sudano, inter kies parencoj troviĝas kaj metodistoj kaj baptistoj – do ĉi tiuj ŝercoj ja estas politike korektaj!





# “Humuri internacie estas ege pli malfacile, ol humuri

tiu frazo. Iom poste, en la kompilo *Esperanto Subgrunde*, la grupo *La Valsistinoj* blekis en unu el siaj kantoj la vortojn “Ora Pug”. Ankaŭ tiu esprimo sonis ridige al miaj oreloj. Do, mi iom miksis ambaŭ esprimojn, kaj tiel aperis la nomo *Vola Püg’*...

– *Kio estas la celo de via gazeto? Amuzi aliajn, amuziĝi mem?..*

– Nu, jes ja, ambaŭ. Ni celas unue ridigi esperantistojn, ja ili, same kiel ĉiuj aliaj homoj – esperantistoj ja ne estas eksterteranoj (*ridetas*) – ofte emas ŝerci kaj ridi dum renkontiĝoj. Sed kiam oni legas diversajn eldonaĵojn en Esperanto,

oni trovas multe da seriozaĵoj kaj tro malmulte (laŭ mi) da okazoj por ridi. Tial ni volis doni unu plian okazon por tio. Alia nia celo estas ankaŭ instigi desegnemulojn pliriĉigi la Esperanto-kulturon per originalaj bildstrioj.

– *Kiom da abonantoj vi havas nun? Supozeble iom pli multe, ol kiel sur la bildo en la gazeto, ĉu ne?*

– Nun en la dissendolisto de *Vola Püg’* estas 165 abonantoj. Sed ne vere temas pri abonado, ĉar *Vola Püg’* estas tute senpaga gazeto, kiun kiu ajn povas legi, ĉu abonanto aŭ ne. La dissendolisto utilas nur por averti la plej fervorajn legantojn pri ĉiu nova numero de *Vola Püg’*. Ĝi ja estas neregula gazeto, kaj nova numero povas aperi iam ajn. Sed kompreneble ĝin legas multe pli ol 165 personoj: ĉiutage ĝin vizitadas sufiĉe multe da homoj.

– *Kiom vi estis influita de La KancerKliniko?*

– Tre trafa demando – jam de pluraj jaroj mi estas ĝia fervora leganto. Tiu papera gazeto anoncas sin “politika, kultura, skandalema kaj ajnista”, kaj foje ties ĉefredaktoro Ĵak LE PUIL rakontis al mi, ke kelkaj komparis *La KancerKlinikon* kun la famaj francaj satir-gazetoj *Le Canard Enchaîné* [kanar anŝene] kaj *Charlie Hebdo* [ŝarli ebdo]. Krom la politiksaturaj, ekzistas en la franca gazetaro ankaŭ alia speco de gazeto, kies unua celo estas ne politika tiklo, sed

humuro tutsimple. Tio tamen ne malpermesas iom da satiraĵoj de tempo al tempo. Por resumi la celon de *Vola Püg’* mi uzos preskaŭ la saman sloganon, kiel tiu de la humurgazeto *Fluide Glacial* [fluid glasial]: *Umour et Bandessinees* [umor e bandesine] – humuro kaj bildstrioj (kaj iom da ceteraĵoj).

Ni do ne estas rekte influitaj de *La KancerKliniko*, kvankam kelkaj ties desegnistoj partoprenas ankaŭ la *Volapüg-*an aventuron. Ni havas iom malsimilajn celojn (ekzemple, se mi iam faros kulturalan verkon aŭ sufiĉe politikan desegnaĵon, tiam mi prefere sendos ĝin al *La KancerKliniko*), malsimilajn aspektojn (unu estas papera, la alia – virtuala) ktp. Sed ĝuste tial mi persone opinias, ke ambaŭ gazetoj estas komplementaj kaj ambaŭ tre legindas!

– *Rakontu pri la kunlaborantoj de Vola Püg’. Kiu fakte konsistigas vian teamon? Ĝenerale, rakontu pri via “redaktora kuirejo”!*


– Por starigo de la teamo mi unue faris kelkajn rektajn kontaktojn kun la desegnistoj, kiujn mi jam konis, poste – per anonceto disvastigita tra la reta Esperantio. Tiel kolektiĝis en 2002 eta teamo de desegnantoj kaj/aŭ ideantoj, kaj de tiam aldoniĝis kelkaj pliaj personoj. Nun estas dudeko da homoj en la dissendolisto por la kunlaborantoj, sed ne



“*Vola Püg’* <<http://volapug.net>>, nova reta gazeto tute senpaga (sed ne ĉiam senpaga ;-)) nur pri humuro kaj bildstrioj” – tiun priskribon vi trovos en ĉiu retserĉilo, se vi tajpos tie la vortojn “*Vola pug*”. Ĉu do finfine aperis revuo en la lingvo *Volapük*? “*Tute ne, – skribas la redaktantoj. – Tio estas nur plia revuo en Esperanto... La revuo, en kiu ni NE parolas pri: 1) la lasta ĉiusemajna kunveno de la loka emeritaĝula E-o-klubo; 2) la kongreso de la esperantistaj insektokolektantoj; 3) la mencio de la vorto “Esperanto” sur iu murskribaĵo de necesejo en la norda stacidomo de Parizo; 4) la prelego pri prilumado de la venonta IJK; 5) la plej bona metodo konvinki esperantistojn, ke Esperanto estas bona lingvo; 6) kaj nek pri la koloro de la kalsoneto, kiun L.L. ZAMENHOF surhavis dum la UK de 1913. Ĝi temas pri multaj pli amuzaj aferoj: komiksoj, bildaĵoj kaj ĉiaj humuraĵoj!” Multaj esperantistoj jam malkovris por si tiun revuon. **KONTAKTO** certe ne povis maltrafi la okazon intervjui por tiu ĉi numero ĝian ĉef-redaktoron – Henri DE SABATES, Francio.*

– *Rakontu, kiel naskiĝis Vola Püg’? Kiel trafis vin la ideo ĝuste pri tiu nomo?*

– Nu, tio estas sufiĉe longa rakonto, sed mi provos resumi. La ideo pri humura gazeto naskiĝis en mia cerbo aŭtune 2000, kvankam la ekrealigo de la provnumero efektiviĝis nur somere 2002. Pri la nomo – mi ĝin ŝuldas al du aferoj. Mi volis uzi iun vortludon kiel titolon, kaj unuafoje mi trovis la insult-esprimon “*volapugisto*” en la slangvortareto “*Knedu min, sinjorino*” de R. CORSETTI. Jam tiam tre amuzis min



EL *VOLA PÜG’*



ĉiuj partoprenas regule. Kelkaj el ili ankorau eĉ neniam kontribuis.

Plej aktivas ĉefe kvar personoj. La Platano kaj mia frato R@f estas la plej desegnemaj. Mi mem (Hodos) enpaĝigas la ricevatajn kontribuadojn, redaktas kaj verkas (ĉefe por la mankantaj rubrikoj) kaj iom desegnas, kiam mi havas tempon. Axel584 okupiĝas ĉefe pri la teknikaj flankoj de la TTT-ejo.

– **Kelkaj personoj iom riproĉetis, ke la humuro en Vola Püg' estas tro franceca aŭ okcident-eŭropa...**

– Tion mi tre bedaŭras. Prave, ke la kvar plej aktivaj kunlaborantoj estas francoj, sed mi tre bonvenigus, ke aktivu ankaŭ alilandanoj. La celo de *Vola Püg'* tute ne estas trudi iun specifan humuron, sed doni eblecon al ĉiuj kaj ĉiaj humuroj esprimi sin. Mi plurfoje pripensis tiun demandon, ĉar humuro estas tre ofte (eble eĉ ĉiam) ligita al iu kulturo, kaj humuri tiel internacie estas ege pli malfacile, ol humuri naci-skale. Nu, ni povas interalie bazi niajn ŝercojn sur la kulturo de Esperanto, sed tio ne ĉiam sufiĉas. Kaj ĉiukaze mi scias, ke estas kelkaj aferoj, kiuj amuzas iujn kulturanojn kaj ne amuzas aliajn. Tial mi tre deziras, ke al *Vola Püg'* kontribuu homoj el plej diversaj kulturoj. Estus bone havi kontribuojn ankaŭ de azianoj, ĉar la azia komiks-arto tre malsimilas la okcident-eŭropan, kaj mi trovas ĝin tre interesa.

Mi kelkfoje rimarkis, ke iuj homoj hezitas kontribui al *Vola Püg'*, ĉar ili ne trovas tie sian humuron. Oni eĉ iam riproĉis al ni nian tro “junecan” humuron, kvankam tio ne veras, ĉar ne ĉiuj kontribuantoj estas junuloj. Oni ne pensu tiel, *Vola Püg'* ne havu nur unu humor-stilon. Male – ĉiuj rajtas buntigi ĝin per diversstilaj humuroj. La celo de Esperanto estas ĝuste malkovrigi unu al la alia siajn kulturojn!

Cetere, lasta vorto pri *La KancerKliniko*: estas amuze konstati, ke ambaŭ gazetoj estas francaj inici-


atoj kaj ĉefredaktataj de francoj, kvankam similaj gazetoj sendube ekzistas en ĉiuj landoj – ekzemple, *Mad* en Usono aŭ *Arena Komiks* en Pollando. Mi ne scias la kialon de tio, sed mi volas diri al ĉiuj nefrancoj: ne lasu al francoj la monopolon de la humuro. Ne hezitu kontribui! (*ride-tas*).

– **Prave! Sufiĉos, ke la plejparto da “humuraj” vortoj, inkluzive de la vorto “humuro” mem, havas francan originon... Bone, parolu ni pri aliaj aferoj. Cetere, ĉu vi ricevas multajn reagojn de ofenditaj homoj?**

– Nu, ni ricevas kelkfoje reagojn de legantoj (ĉefe post apero de ĉiu nova numero), sed plejofte temas pri pozitivaj reagoj. Ni ricevis sufiĉe malmulte da mesaĝoj de ŝokitaj personoj (aŭ tiuj reagis ne rekte al ni). Ni ne celas ofendi aŭ skandaligi homojn (kvankam *La KancerKliniko* siaflanke proklamas sin “skandalema” revuo). Sed, kiel mi jam diris antaŭe, humuroj malsimilas laŭ kulturoj, kaj mi jam havis la sperton en aliaj okazoj (pri kiuj vi eble iom ekscios de la kvara numero de *Vola Püg'*) observi tion. Ekzemple, mi jam rimarkis, ke en Francio oni ofte ŝatas ridigi homojn ŝoketante ilin. La celo de la franca humuro tamen ne estas ŝoki, sed ja ridigi, kaj ŝoketo estas nur ilo por tio. Aliaj kulturoj uzas aliajn rimedojn por atingi tiun celon, kaj mi tre avidas malkovri ilin.

– **Dankon pro la intervjuo kaj sukcesojn al vi!**

Demandis Ĵenja ZVEREVA kaj Joel AMIS



## Nomoj en diversaj kulturoj

Slavik IVANOV, Rusio

Kelkaj etnoj donas al siaj infanoj nomojn nur de negranda fiksita listo: tial kiam mi studis en mezlernejo, en mia 30-homa grupo estis tri knabinoj kun la nomo Jelena kaj du kun la nomo Irina. En Rusio inter siaj konatoj oni ĉiam trovas po kelkajn homojn kun la sama nomo; la plej popularaj estas Aleksandro (Saŝa), Vladimir (Vova), Sergej (Serjoĵa), Anna (Anĵa), Irina (Ira), Natalja (Nataŝa). Ĉu manko de unikaj nomoj estas tio, kio kaŭzas, ke ni de temp' al tempo forĝas aŭ miksas nomojn de niaj konatoj?

Ekzistas tamen kulturoj, kie nomoj multe pli varias. Ekzemple en Osetio, montara teritorio en centra Kaŭkazio, kie mi naskiĝis kaj longe loĝis, eblas renkonti homojn kun plej nekutimaj nomoj – ekzemple, patro de mia bona amiko estas laŭ ĉiuj dokumentoj Napoleon...

Jen kian historion mi legis en aprila (2001) numero de la oseta literatura revuo “Maĥ Dug”.

Iam grupo de osetaj verkistoj estis en iu vilaĝo en granda festeno. Unu el ili, juna poeto, eldiris pri la alia spontanee rim-ŝercon:

– Bona homo estas Simirĵa’,

– Ho, sed mankas apud li livĵa’.

(Livĵa’ estas vianda mangaĵo). Tion aŭdis apude staranta knabo (ĉe similaj festenoj ĉiam estas starantaj junaj helpantoj, kiuj priservas la pliaĝulojn, samtempe transprenante tradiciojn kaj saĝon). Kun ioma ofendiĝo li diris: “Kara, kial vi diras tion? La tabloj plen-plenas, jen staras ujo ankaŭ kun livĵa’, mi alportu, ĉu?”

– Ne, – respondis la juna poeto, – pardonu, mi nur pro rimo tiel diris pri livĵa’.

– Pro Rimo? Sed kial Rimo mem ne venis? Ni trairis la tutan vilaĝon de domo al domo, ĉiujn invitis.

– Vidu... – konfuziĝis la poeto, – ŝi bedaŭrinde malsanas, neniel povis Rimo mem veni al la festeno.

– Nu tiam estas alia afero, – konsentis la staranta knabo. – Atendu, mi rapide kolektos pakajon por ke vi transdonu de nia tablo al la malsana Rimo.

Kion farus la juna poeto? Jes, li prenis la pakajon kun bongustaĵoj por sia “malsana Rimo” – kaj eble pro tio poste iĝis fama. Tamen liaj amikoj moketas pri la okazintaĵo ĝis nun.

Bedaŭrinde, en nia mondo, kiu rapide perdas diversecon kaj en naturo, kaj en kulturo, neniigas kulturaj specialecoj de negrandaj etnoj. La hodiaŭaj osetoj elektas nomojn por siaj infanoj el pli kaj pli limigita listo, ĉefe de la nomoj, kiujn uzas pli grandaj popoloj.



# Kiel mi gajnis en konkurso de anekdotoj



KOMPLEZE DE J.Z.

En la ĉemara promenato de la ukraina ripozurbo Jalto oni povas aĉeti diversajn amuz-"dokumentojn". Troviĝas tie "identigilo\*" de "Agento de KGB" aŭ "de FBI", de "mal-sata studento", "novriĉulo", "ideala edz(in)o" ktp. Oni aĉetas la "dokumentojn" por mem amuziĝi aŭ distri amikojn. El ĉiuj ceteraj plej plaĉis al mi "Identigilo de moviĝanta katastrofo", kiu "donas la rajton fali sur ebenaĵo, frakasi aŭtojn, plafonojn kaj murojn, rompi aĵojn kaj trovi ĉiaspacajn aventurojn...". La "identigilon" mi certe aĉetis. Kaj kiel mi eksciis poste, la "inspiranto" de tiu ĉi teksto estis Jefim ZAJDMAN, el Jalto: la teksto efektive estis verkita pri li... Sed antaŭ ol konatiĝi kun Jefim persone, mi aŭdis de esperantistoj diversajn amuzajn historiojn, kies ĉefheroo estis Jefim. Tiam mi eĉ pensis, ke "Jefim" estas iu elpensita heroo de ĉiuj amuzaj rakontoj... Kaj jen – tute ne elpensita, sed plene reala Jefim (rigardu la foton!) – kontribuas al la humura *KONTAKTO!* – Red.

Jefim ZAJDMAN, Ukrainio

Antaŭ multaj jaroj mi partoprenis SAT-kongreson en Sankt-Peterburgo. Tie okazis konkurso de anekdotoj. Kvankam pro miaj distriĝemo kaj forgesemo mi tute ne memorifikas anekdotojn, mi decidis partopreni la konkurson, ĉar pro la menciitaj ecoj mi mem trafas anekdotajn situaciojn kaj rezulte anekdotoj aperis pri mi. Bedaŭrinde, eĉ tiujn mi memoras nur parte, sed mi rakontos, kiom mi rememoros.

Krom mi, la konkurson partoprenis ankoraŭ kelkaj esperantistoj, sed mi memoras nur la plej seriozajn konkurantojn: el Rusio (Permj, Sankt-Peterburgo) kaj Francio. Ĉiu rakontis laŭvice po unu anekdoton.

La unua mia estis mallonga. "Iras mi laŭ la strato kaj lamas. Oni demandas: 'Kial vi lamas?' – 'Ne scias, – respondas mi', – iras plu

kaj subite rimarkas, ke unu piedo surpaŝas la trotuaron kaj la dua – la ŝoseon".

La anekdoto ne havis rimarkindan sukceson. Post kelkaj konkurantoj venis mia vico por la dua anekdoto. "Iam venis al mi gaste esperantistoj, kaj mi preparis por ili salaton el tomatoj kaj kukumoj en majonezo. Sed kiam ili ekmanĝis, evidentiĝis, ke anstataŭ majonezon mi hazarde enverŝis... gluon, kiu ne nur havas la saman koloron, sed ankaŭ estas vendata en simila vazeto! Ĉar mi ne plu havis legomojn, mi iris en la kuirejon, kaŝe tralavis la legomojn kaj enverŝis la majonezon... Mi ne scias, pri kio mi pensis tiumomente, sed laŭ la mienoj de la amikoj, kiuj ekmanĝis, mi kun teruro komprenis, ke mi denove gustumigis ilin per la gluo..."

La anekdoto ege plaĉis, sed la konkurantoj rakontis kaj rakontis. La sekva mia estis tia. "Mi havis enĉambre kamenon, kiu ne funkciis. Oni do rekomendis simple "enkamenigi" en la veran kamenon elektrokamenon, kaj la vera taŭgus simple kiel ornamaĵo. La ideo plaĉis al mi, kaj mi decidis tuj ĝin efektiviĝi. Mi mezuris la altecon kaj larĝecon de la kamenaperturo kaj kuris al vendejo. La tie vendata elektrokameno taŭgis laŭ la larĝeco, sed estis iom pli alta. 'Ne gravas, – decidis mi – eblas forsegi la supran dekoracion'. Reveninte hejmen, mi tuj komencis plenumi la taskon. Tio ne estis facila, ĉar necesis ja segi metalon. Post horo la laboro estis duonfarita. En tiu momento venis nia klubano Miĉjo kaj demandis, kion mi faras. Post la klarigo li suspekto ekrigardis min kaj, alirinte al la kameno, prenis la elektrokamenon, iom klinis ĝin kaj facile enigis! 'Diable! – ekkriis mi. – Eĉ simio konjektus...'"

Post tiu anekdoto la aŭskultantoj anstataŭ ridi komencis suspekto rigardi min, kvazaŭ ili ekdubis, ĉu mi estas normala homo. Iu el la konkurantoj cedis, sed aliaj daŭrigis la batalon. Kaj jen la sekva anekdoto.

"Mia katino, Amuza, ofte malpurigis la plankon, ignorante specialan necesejon. Por dekontamigi ŝin, mi ĉiufoje, kiam tio okazis, ŝovis ŝian nazon en la kakaĵon. Iufoje, parolante kun la sama Miĉjo, mi rimarkis surplanke pecon de malpuraĵo. Do mi kaptis la katinon kaj, ŝovante ŝian nazon en la malpuraĵon, ripetadis: 'Kiam vi ĉesos kaki en la ĉambro?!' 'Kion vi faras, – kriis Miĉjo, – tio ja estas la manĝaĵo, kiun vi mem ĵetis al ŝi antaŭ

minuto!' Povra katinjo! Ŝi iĝis skizofrenia, ĉar ŝi ne sciis, kio estas permesata: manĝado aŭ malmalmanĝado".

Fine mi jam ne plu memoris anekdotojn, sed bonŝance apude sidis mia samklubano, kiu rememorigis al mi kelkajn pliajn. La lasta anekdoto, konata en mia klubo kun la nomo "anekdoto pri la kokinoj", alportis la gajnon. Jen ĝi!

"Al la komputilcentro, kie mi laboris antaŭ perestrojko, de tempo al tempo oni liveris kontraŭ malpli alta prezo manĝaĵojn por la laborantoj. Unufoje mi aĉetis kokinon, sed forgesis ĝin sur la labortablo. Sekvamatene ĝi jam malbonodoris. Tamen sekvafoje mi decidis aĉeti, ĉar oni konsilis al mi tuj meti ĝin en la komunan fridujon de la laborejo. Tial mi kuraĝis aĉeti eĉ du kokinojn. Ĉu vi atendas, ke mi tuj diros, ke mi forgesis enmeti? Ne, mi enmetis. Kaj forgesis elpreni postlabore. Tio okazis vendrede, do kiam mi hejme rememoris pri tio, mi decidis el-fridujigi la kokinojn lunde, kiam mi venos labori. Sed mi tute forgesis, ke dum nelaboraj tagoj oni tie malfunkciigas la elektronon.

Lunde la kokinoj estis certe jam putrintaj, kaj mi ĵetis ilin (por hundoj aŭ katoj) en profundan kuvon ĉe la malantaŭa flanko de la laboreja konstruaĵo. Nun por kompreni la situacion necesas iom klarigi, kia estis la konstruaĵo. Ĝi estis duetaĝa: la ejo por programistoj, kie mi laboris, situis sur la dua etaĝo. Sur la unua estis la komputila halo, provizita per klimatiziloj, kies rolo estis enĉambriĝi freŝan aeron. La kokinoj kuŝis ĝuste sub la fenestroj de tiu ejo kaj la klimatiziloj bone funkciis, pumpante la aeron de malantaŭ la muro. Lunde la elektronikistoj en la halo flaris la odoraĉon kaj ne povis kompreni ties originon. La sekvan tagon ili decidis, ke ie subplanke kuŝas mortinta rato, eble eĉ kelkaj, ĉar la odoraĉo estis jam ne eltenebla. La komputilon ili malŝaltis, kaj la trian tagon ricevis de la estro permeson trarompi la plankon. Pri ĉio ĉi mi nenion sciis.

Post kiam neniu ratoj troviĝis, oni komencis serĉi ekster la konstruaĵo kaj ekvidis en la kuvo la kokinojn... Kiu ilin ĵetis tien, por la kunlaborantoj ne estis problemo diveni... Post tio la elektronikistoj dum duonmonato ne parolis kun mi..."

\* identigilo – pruv-dokumento

## Internacia Arta E-festivalo Velura Sezono-2004

(Jalto, la 11-19an de septembro)

Jalto estas fama ripozurbo en la duoninsulo Krimeo ĉe la Nigra Maro (Ukrainio). Ĝi estis unu el la luliloj de la pionira E-movado en Rusio – en la urbo estas du memortabuloj omaĝe al famaj pioniroj de la E-movado.

Post multjara interrompo ĉi tie reaperas la fama *Velura Sezono*. Ĝi iam kunigis multajn E-muzikistojn kaj muzikemulojn; pluraj el ili fariĝis steluloj. Tage okazis ekskursoj, turistaj marŝoj, diskutoj (ofte surplage); malfruvespere – koncertoj en haloj kaj sur la kajo.

La festivalo okazos dum la tempo, kiun en Jalto oni nomas "velura sezono", kiam la maro varmas, la suno mildas kaj fruktoj abundas.

La festivalo estas parto de la agado "Vizaĝe al la ekstera mondo": ĝin partoprenos ankaŭ neesperantistaj bardoj kaj okazos diverslingvaj koncertoj ankaŭ por la urbanoj, ripozantoj kaj eksterlandanoj, kiuj tiutempe abundos en Jalto.


La partoprenantoj loĝos en modesta ripozejo, situanta en pitoreska pinarbaro en la ĉirkaŭaĵo de Jalto. Tie estas 100 nemultekostaj lokoj en ĉambroj kun 2-3 litoj kaj ankaŭ kun la ebleco loĝigi homojn en malmultekosta amasloĝejo. Dezirantoj havos la eblecon resti tie por ripozo (tiutempe la prezoj por loĝado en tiu ejo estos pli malgrandaj kompare kun la aliaj).

Jen la provizora programo: inaŭgura orgena koncerto; malfermaj diverslingvaj koncertoj; ekskursoj, turistaj marŝoj; seminario pri muzika E-kulturo; renkontiĝo de pentristoj kaj skulptistoj; rolaĵ kaj intelektaj ludoj; "Barda kafejo" – nokte ĉe lignofajro;

nokta koncerto sur la kajo kaj nokta naĝado.

Ni sopiras revidi laŭreatajn kaj partoprenantojn de la antaŭaj festivaloj *Velura Sezono* kaj invitas ĉiujn aliajn E-artistojn kaj spektantojn.

La festivalon organizas jalta E-klubo *Tero* kune kun la poltava krea unuigo *Gaudeamus*, kiega E-klubo *Kare* kaj moskva E-klubo *Masi*. Loka organiza komitato: <espero@yalta.crimea.ua>, <tero@yalta.us>, <www.krimeo.h12.ru>. UA-98612, Ukrainio, Jalto, a/k 74 (Esperanto). Tel. (+380-654) 231651. Jefim ZAJDMAN.





# Bervalo – la vera Esperantujo, aŭ: Serĉu la ŝercon!

Kiam en la redakcio naskiĝis la ideo prepari humuran numeron de *KONTAKTO*, mi aliĝis al la dissendolisto *Anekdotoj en Esperanto*. Interesa fenomeno: 90% de ĉiuj amuzaĵoj aperintaj tie havis la samajn nomojn: *Kruko kaj Baniko*. Pri tio “kulpas” Rikardo CASH, ŝajne, la plej fruktodona kontribuanto al la listo. Mi kontaktis lin kaj – jen la rezulto! – Red.



Rikardo CASH, Francio

*Kruko kaj Baniko* estas integra parto de la Esperanta kulturo ekde 1970. En tiu jaro aperis la libro *Kruko kaj Baniko el Bervalo* de Louis BEAUCAIRE, kun la subtitolo “Maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj”. Louis BEAUCAIRE (1925-1983, esp. 1941) estis franco, kaj estris la Francan Librejon en Berlino ĝis sia multe tro frua morto. Bervalo estas elpensita de li landeto ie ĉe Mediteraneo. Mi komparas ĝin kun Monako. *Kruko kaj Baniko* estas du bervalanoj, kiuj ofte aperas en la anekdotoj.

En 1974 aperis lia dua libro, *El la vivo de Bervalo sentaŭgulo*, kun la subtitolo “Maldeceta epizodaro”; temas fakte pri noveletoj. La tria libro – *Fabeloj de la Verda Pigo* – aperis en la 1980aj jaroj. Kaj ankaŭ tie foje rolas Bervalo. Bedaŭrinde, *Kruko kaj Baniko el Bervalo* estas elĉerpita; almenaŭ ne aĉetebla de UEA. Sed ĝi estas trovebla rete, ĉe eLibrejo de <www.esperanto.nu> (en PDF-formato, sen la bildoj); aŭ ĉe la retejo de Jurij FINKEL, <www.esperanto.mv.ru>, HTML-e, kun la bildoj.

Nuntempe, *Kruko kaj Baniko* ludas gravan rolon en la reta dissendolisto *Anekdotoj en Esperanto* (ĉe <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-anekdotoj>), ĉar mi sukcesis “revivigi” ilin tie. Dum longa tempo mi serĉis manieron reprezenti “naciecajn” ŝercojn, ne ofendante aliajn personojn (en la hodiaŭa mondo ekzistas la terura tiranaĵo “politika korekteco”). En ĉiu socio ekzistas ŝercoj pri iu celgrupo. Ekzemple, francoj primokas belgojn, usonanoj – polojn, viroj primokas blondulinojn ktp. Mi decidis anstataŭigi tiujn suferantojn per pli-malpli neekzistanta grupo, kiu samtempe rekte rilatus kun nia esperanta kulturo. Unue mi provis uzi idistojn, sed ja ekzistas ankoraŭ kelke da ili. Poste mi provis uzi volapukistojn, sed mi trovas tiun vorton tro longa. Nun mi uzas bervalanojn, kaj tio ŝajne tre bone funkcias, ĉar ĝis nun neniu plendis pri tio (almenaŭ neniu bervalano...). Eĉ aliaj samlistanoj uzas ilin.

Jen unu anekdoto prenita el *Kruko kaj Baniko*:

*Kruko pagis al sia filino monatan restadon en Grezijono, por ke ŝi perfektigu siajn lingvajn konojn. Post sia reveno ŝi deklaras gaje:*

– Paĉjo, mi ne plu estas virgan.

– Fi! Hontu. Mi elspezis tiom da mono, kaj vi ankoraŭ ne kapablas korekte uzi la akuzativon.

Kaj jen kelkaj miaj ŝercoj el la dissendolisto *Anekdotoj en Esperanto*:

*Kruko konstante pasigas noktojn en la polica malliberejo pro troa drinkado. Unu fojon, liberigante la friponon, la inspektoro adiaŭas lin per la vortoj: “Mi ege esperas, ke ni ne plu revidos unu la alian ĉi tie!” – “Kial? – miras la postebria Kruko. – Ĉu vi trovis alian postenon?”*

*Kruko kaj Baniko kumposedas somerdomecon kaj pasigas tie siajn feriojn. Ĉiujare okazas same: dum Baniko okupiĝas pri la ĉiam-necesaj riparoj kaj farbado, Kruko simple prenas bonan libron kaj sidas sur benko antaŭ la domo. Ĉi-jare Baniko decidas reagi. Frumatene li dike farbis la benkon kaj... “Ĉu la libro estas interesa?” – demandas Baniko. – “Jes, – respondas Kruko. – Ege”. – “Kaj ĉu vi bone sidas?” – “Jes. Tre komforte”. – “Diru, Kruko, kiel estus por vi sidi sur freŝfarbita benko?” – “Tio estus malagrabla afero”, – diras Kruko eĉ ne levante la kapon. – “Ĉu vi pensas tiel?” – incitas Baniko. – “Jes. Precipe, se oni portas novan pantalonon”. Baniko ne plu eltenas kaj ĝoje ekkrias: “Ho! Mi ja hodiaŭ matene farbis la benkon, sur kiu vi sidas!” Sed Kruko apenaŭ atentis, nur mallonge respondas: “Tion mi scias”. – “Kaj vi tamen sidas sur la ankoraŭ malseka benko?!” – miras Baniko. – “Kial ne? – flegme kapjesas Kruko. – Mi ja surmetis vian novan pantalonon!”*

**<Humuraj legaĵoj aĉeteblaj ĉe la libroservo de UEA>**

**Bona rido.** ESE. Malmö. 1965. 85 paĝoj. 3 EUR (humura anekdotaro).

**Distra koktelo.** Aŭstria Esperantista Federacio. Vieno. 128 paĝoj. 1,8 EUR (humuraj legaĵetoj).

**Elektitaj satiroj.** Efraim Kišon. Bleicher-Eldonejo. Gerlingen-Stuttgart. 1981. 111 paĝoj. 9 EUR

EL LA LIBRO KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo



(tridek skizoj de la mondfama israela humoristo).  
**Epigramoj.** J.I. SZTAUDYNGER. Bielsko-Biala. 1987. 25 paĝoj. 1,2 EUR (rimaĵoj de populara humoristo).

**Frenezetaĵoj.** Vladimír GAZDA. Bratislava. 1992. 18 paĝoj. 1,20 EUR (humuraj baladoj).

**Gabrielo. Historio de maldika vireto.** Henriëtte van EYK. Den Haag. 1990. 203 paĝoj. 7,80 EUR (delikatsenta, humura fabelo por plenkreskuloj).

**La gimnazio.** Šalom Aleĥem. JELK. Osako. 1988. 102 paĝoj. 6.60 EUR (humura monologo laŭ juda tradicio).

**Ili kaptis Elzan!** Johán Valano. Fonto. Chapecó. 2000 (3a eld.). 85 paĝoj. Prezo: 9,3 EUR (humura romano en facila lingvaĵo).

**Instrua amuzo.** Stano MAREK, Stano MARKOVIĀ. 1979. 36 paĝoj. 2,40 ERU (krucvortentigoj kaj humuro).

**Legu kaj ridu.** ĈEE. Pekino. 1992. 76 paĝoj. 2,7 EUR (cent antikvaj ĉinaj humorajoj).

**Ljusjka Benc.** Viktor SAPOŬNIKOV. Sezonoj. Jekaterinburg. 1992. 74 paĝoj. 4,80 EUR (noveloj kaj humorajoj).

**Lukio aŭ azeno.** Lukiano. Fonto. Chapecó. 1988 (2a eld.). 43 paĝoj. 3,9 EUR (humura rakonto).

**Nenio fremda por mi fremdas. Aforismoj.** Veselin GEORGIEV. Moskvo. 1998. 102 paĝoj. 5,40 EUR (saĝaj kaj humoraj frazoj de bulgara aŭtoro).

**Orm la ruĝa.** Frans G. BENGSSON. ESE. Malmö. 1989. 216 paĝoj. 9 EUR (aventura kaj humurplena proza episo pri la vikinga socio kaj la alveno de kristanismo).

**Pendumilaj lidoj.** Kristiano MORGENŠTERNO. Gerlingen. 1980. 108 paĝoj. 6 EUR (humuraj versaĵoj)

EL LA LIBRO KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo



# La mirindaj aventuroj de



LODE, BELGIO

Iam estis ke, antaŭ muuuuuultaj jaroj, dum iu mateno, la simbolo 'O' spertis tutan identeckrizon. Kaj kion tio signifas vi, kara leganto, serĉu en vortaro.

Ĉiukaze, 'O' sentis sin tre malbone, ĉar ĝi ne sciis, ĉu ĝi estas ina aŭ malina, eĉ ne sciis kion ĝi signifas: ĉu 'O' (nulon) aŭ ĉu 'O' (la literon 'O'). Ĝi longe rigardis en la spegulo, sed vane: 'O' kaj '0' tiel similas, ili aspektas tiel preskaŭ tutsamaj, ke 'O' ekploris. Pro ĉio ĉi, 'O' ekhavis minuskomplekson: ĝi sentis sin nekredeble neutila, nula, por tiel diri. Dum fakte minuskomplekso ne eblas, ĉar nulo ne estas minusa nombro kiel '-1' aŭ, ni diru, '-25', kio estas tre malvarma temperaturo, sed nulo estas inter pozitivaj kaj negativaj nombroj, sed neniu el ambaŭ. Kaj tiu ekkompreno ankoraŭ pli deprimis ĝin: ĝi estis kvazaŭ nenio en sia nenieco.

Hazarde preterpasis ĝuste en tiu momento koku, kiu iom aŭdis de la lamentoj de 'O'. Kaj la koku diris:

– Hej, 'O', mi estas koku, tio signifas 'K-K', duobla 'K', do se mi metos unu el miaj 'K'-oj ĉe vin, do vi estos 'OK'. Se vi volas akompani min, kompreneble.

– Jes, – respondis 'O', – kompreneble, mi estas tiel sola. Sed mi daŭre ne scias, ĉu mi estas 'O' aŭ '0'.

– Nu, – respondis 'K' saĝe, – kune ni estas kaj literoj kaj numero. Vidu: 'O' kaj 'K' estas du literoj, kaj kune ni valoras '8'.

– Uaŭaŭ, – elkriis 'O', – do ni estos okoble pli ol nulo.

– Nu, ne tiel, – respondis 'K', sed 'O' ne aŭskultis.

“Nu, ne gravas, – pensis 'K', – tiu blonda litero verŝajne ĉiukaze ne komprenus tiun algebron”. Kaj kune ili rigardis sin per la spegulo kaj 'K' vidis, ke estis bone.

Kontentaj, 'OK' marŝis plu, pasigis multajn tagojn kaj noktojn kune... kaj 'O' laŭgrade komencis dikiĝi sufiĉe multe. Kaj jes: du mona-

tojn kaj unu semajnon poste – ĉar ĉe literoj tio iras pli rapide ol ĉe la homoj – naskiĝis ilia unua ido: tre bela litero 'a', tre proksime al la litera turo. Kune ili formis 'OKa' ('aKO' ankoraŭ ne estas registrita Esperanta vorto), do ili ja devis stari en vico post 'SEPA', sed tio ne tro gravis: la signifo ne vere ŝanĝiĝis. Ili simple transiris de numeralo al numeralaj adjektivo.

Ili disponis pri tre bela spaco, konvena al juna familetio por vivi agrable. Post unu sezono, 'a' jam fariĝis granda kaj forta 'A', je la fiero de siaj gepatroj.



Kompreneble, la vivo estas dinamika koncepto, kaj intertempe la sezonoj ŝanĝiĝis kaj ekfalas muuuulte da pluvo sur la literkampon. Tio muuuulte da pluvo, ke la litero 'T', preterpasante, glitfalas kontraŭ la familio 'OKA'. La familio 'OKA' tute renversiĝis kaj gluiĝis al 'T', kaj kune ili formis 'KOTA'... jes: la pluvo transformis la kampon al vere kota loko. Je la bedaŭro de ĉiuj literoj el la novformita vorto.

Tie ili kuŝis, tute malpuraj, malbelaj, malamataj en la sabla ŝlimo. Tute sola, sola, soooooola! 'O' ĝemis; 'A' faris muskol-ekzercojn; nur 'T' kaj 'K' provis trovi solvon pri tiu ĉi kota afero. Ili serĉis novajn literojn por kombini, sed 'S' por 'kosta' ankaŭ ne estas populara vorto, kvankam 'T' ja opiniis la literon 'S' ege bela, alloge formita litero. Plie, 'S' ne volis forlasi 'EPA', ĉar tio ne havas

sencon.

S i m i l e , 'NAŬA' ne volis cedi 'N', post alloga propono de 'Z' labori en la Nova PIV por reprezenti la vorton 'NAŬZA' ĉar la salajro estas tre alta.

Fine, rigardante la televidilon, la saĝa 'K' (ne senkiale la unua litero de la vortoj 'KAPO' kaj 'KLERA') trovis la solvon: ili povas anagrami formi la vorton 'KATO' kaj forkuri. Kaj dirite-farite, la literoj 'O' kaj 'A' ŝanĝis lokojn en la vorto, kaj la 'KOTA' releviĝis kiel bela, eleganta 'KATO'. Tio kompreneble ne plaĉis al la vorto 'MUSO', kiu apude serĉadis fromaĝeron, kiu ĵus antaŭe ankoraŭ troviĝis en la kota kampo, sed kiu intertempe malaperis, kune kun la fromaĝero.

'KATO' ĉasis la muson, kiu provis kaŝi sin en eta truo de arbo. 'KATO', sub la gvido de la litero 'K', kiu faris planon, kaj kune kun la litero 'P', decidis pri 'PAKTO': ĉiuj literoj silente sin kaŝis malantaŭ apudaj ŝtonetoj kaj arboradikaj elstaraĵoj. Ĝis la fina venko, kiam ekaperis singarde la povra museto kiu, sensuspekta, surpriziĝis de ĉiuj literoj, kiuj samtempe sursaltis ĝin. Do el la 'PAKTO' rezultis la 'KAPTO', tre fiera pri sia predo!

Tiel ĉi, ni legis el la biografio de la litero 'O', membro de plej diversaj vortoj, kiel vi povis ekscii dank' al nia fama historiisto M. Zik'.

Epilogo: certe vi volas scii kio poste okazis al nia litero 'O'. Nu, membre de 'KAPTO', malfru-nokte ĝi promenis post vojeraro en malsekura parto de papero, kie freneza membro de radik-ala parto, transformis la vorton 'KAPTO' al ĝia radiko 'KAPT', falgigante la literon 'O' en abismon, kie ĝi frakasrompiĝis sur la malmola grundo. Feliĉe, tie troviĝis 'IO', kiu prenis la disfalintan literon 'O', kiu aspektis kiel dufoje 'C', en sin kaj formis la vorton 'CICO', kiu vivis ankoraŭ loooooonge kaj feliĉe.

## Benjamin FRANKLIN: saĝe kaj sprite

Jen certa rimedo kontraŭ dentodoloro: lavu la radikon de la dolora dento en malnova vinagro kaj lasu ĝin en la suno por sekiĝi dum duonhoro – poste ĝi neniam ekdoloros.

Se via kapo estas vaksa, ne marŝu sub la suno.

Vojaĝanto havu la nazon de porko, la piedojn de cervo kaj la dorso de azeno.

Kiu trompis vin tiel ofte kiel vi mem?

Fiŝo kaj vizitantoj ekfektoras post tri tagoj.

Riĉaĵo apartenas ne al tiu, kiu posedas ĝin, sed al tiu, kiu ĝuas ĝin.

La koro de idioto estas en lia buŝo, sed la buŝo de saĝulo estas en lia koro.

Strange, ke viro, kiu estas sufiĉe

saĝa por verki satiron, estas sufiĉe stulta por eldoni ĝin.

Kvereloj neniam longe daŭrus, se nur unu flanko estus kulpa.

Pruntedonu monon al malamiko – kaj vi akiros amikon, pruntedonu monon al amiko – kaj vi perdos lin.

Sally ridas je ĉio, kion vi diras, kaj ĉu vi scias kial? Ĉar ŝi havas belan dentaron.

En rivero kaj aĉa registaro la plej malpezaj aĵoj flosas supre.

Instruu al via infano teni la langon, kaj ĝi mem lernos paroli.

Malkontenta homo ne trovas komfortan seĝon.

Amo kaj dentodoloro

havas multajn kuracmetodojn, sed neniu el ili estas tiel efika, kiel posedo (de amato) kaj perdo (de dento).

Piedgliton eblas korekti, sed langogliton oni ne povas forgesi.

Multaj kverelas pri religio, kiun oni neniam praktikis.

Mi vidis kelkajn homojn, kiuj mortis pro malsato, kaj mil homojn, kiuj mortis pro mangado.

Se vi deziras havi plaĉan servanton, vi mem servu vin.

La lango ofendas, kaj la oreloj ricevas manfrapon.

Ekzistas nek malbelaj amatoj, nek belaj prizonoj.

Akraj vortoj ne servas

amikecon: kulero da mielo kaptos pli da muŝoj ol galono da vinagro.

Purigu vian monstrofringon antaŭ ol montri per ĝi miajn makulojn.

Sep urboj plore funebriŝ Pro la morto de Homer', En kiuj li almozpetis dum li vivis sur la Ter'.

Edz(in)iĝu al superul(in)o, kaj vi havos mastr(in)on.

Kiu multigas sian riĉaĵon, multigas siajn zorgojn.

Bonaj elspezantoj estas malbonaj prunedonantoj.

Stultulo estas tiu, kiu ne kapablas konsulti sian propran saĝon.

trad. Morteza MIRBAGHIAN, Irano/Usono.



# Unue estis la bito...

Humuro evoluas kune kun la civilizacio kaj pli kaj pli internaciigas. Tio okazas plejparte dank' al interreto: ŝercoj de interreto kaj pri interreto (komputiloj, programistoj, uzantoj, programoj...) jam estas integra parto de la internacia humuro, de kiu ridas, verŝajne, la tuta "interretigita" mondo. Jen esperantigita rakonto de nekonata aŭtoro trovita sur iu interrethumura paĝo.

1. En la komenco Dio kreis la biton kaj la bitokon. Kaj Dio diris: "Estu la vorto"; kaj fariĝis vorto.

2. Kaj estis du bitokoj en la vorto; kaj nenio alia ekzistis. Kaj Dio disigis la Unuon de la Nulo. Kaj Dio vidis, ke tio estas bona.

3. Kaj Dio diris: "Estu la datenoj"; kaj la datenoj fariĝis. Kaj Dio diris: "Estu la datenoj en siaj koncernaj lokoj". Kaj Dio kreis la disketojn, la durdiskojn kaj la lumdiskojn.

4. Kaj Dio diris: "Estu la komputiloj, por ke estu loko kien enmeti la disketojn, la durdiskojn kaj la lumdiskojn". Kaj Dio kreis la komputilojn, kaj Li nomis ilin aparataro.

5. Sed ankoraŭ ne estis programaro. Kaj Dio kreis la programojn grandajn kaj la programojn malgrandajn. Kaj Dio ilin benis, dirante: "Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la tutan memoron de la komputilo".



Oni kreis la plej potencon komputilon en la mondo, enmetis en ĝin ĉiujn troveblajn datenojn kaj informojn, por ke ĝi respondu ĉiujn demandojn, pri kiuj interesiĝas la homaro. Nur unu demando ĝi ne povis respondi: "Ĉu ekzistas Dio?" – "Ne sufiĉas informoj, konektu min al ĉiuj komputiloj sur la Tero". Dirite-farite, sed denove la respondo estas la sama... "Konektu min al ĉiuj teknikajoj sur la Tero". Nu – kion fari? Oni konektis ĝin al ĉiuj teknikajoj

kaj denove entajpas: "Ĉu ekzistas Dio?" – "Jam jes", – tekstis la respondo.

\*\*\*

Ebria programisto revenas hejmen. Starante en la lifto li premas "1", poste "2". "Mi ne komprenas, kie troviĝas "enter" ĉi tie?..

\*\*\*

"Kio okazis? – demandas matene edzino sian edzon-programiston, kiu aspektas tre malgaja. – Ĉu la programo, kiun vi faris pasintnokte, ne ekfunkciis?" – "Ne, ĝi ekfunkci-

6. Kaj Dio diris: "Ni kreu programiston; kaj li regu super la komputiloj, kaj super la programoj, kaj super la datenoj".

7. Kaj Dio kreis la programiston; kaj Dio enmetis la programiston en la datencentron; kaj Dio montris al la programisto la dosierujon. Kaj Dio la Eternulo ordonis al la programisto, dirante: "Ĉiujn volumenojn kaj subdosierujojn vi uzu; sed VNDZn VI NE UZU".

8. Kaj Dio la Eternulo diris: "Ne estas bone, ke la programisto estu sola"; kaj Dio la Eternulo faligis profundan dormon sur la programiston, kaj ĉi tiu endormiĝis; kaj Li prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno. Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun Li prenis de la programisto, kreitaĵon, kiu rigardu la programiston kaj admiru la programiston kaj amu ĉion, kion la programisto faras. Kaj Dio nomis la kreitaĵon: Uzanto.

9. Kaj la programisto kaj la uzanto estis forlasitaj en la nuda DOSo.

10. Sed Vilĉjo estis pli ruza, ol ĉiuj kreitaĵoj, kiujn kreis Dio la Eternulo. Kaj li diris al la uzanto: "Ĉu Dio diris, ke vi ne uzu ĉiujn programojn?"

11. Kaj la uzanto diris al Vilĉjo: "La programojn de la komputilo kaj ĉiujn datenojn ni povas uzi; sed pri VNDZ Dio diris: 'Ne uzu ĝin, por ke vi ne mortu'".

12. Kaj Vilĉjo diris al la uzanto: "Ne, vi ne mortos; sed Dio scias, ke en la tago, en kiu vi uzos VNDZn, malfermiĝos viaj okuloj, kaj vi estos kiel Dio, kaj vi povos krei tion, kion vi volas, per simpla musklako".

13. Kaj la uzanto vidis, ke la fruktoj de VNDZ estis ĉarmaj por la okuloj, kaj pli facile uzeblaj. Kaj la uzanto vidis, ke saĝeco estis neutila, ĉar VNDZ povas ĝin anstataŭi.

14. Kaj la uzanto instalas VNDZn



Kaj nun bone pripensu kaj diru, kiu persono atakis vin ret-poŝte

en sian komputilon, kaj li uzis ĝin, kaj li diris al la programisto, ke ankaŭ li instalu ĝin, kaj li instalas.

15. Kaj la programisto ekserĉis novajn pelilojn. Kaj la programisto kaj la uzanto aŭdis la voĉon de Dio la Eternulo. Kaj Dio la Eternulo vokis la programiston, kaj diris al li: "Kion vi serĉas?" Kaj tiu diris: "Mi serĉas novajn pelilojn, ĉar mi ne povas ilin trovi en DOSo". Kaj Dio diris: "Kiu diris al vi, ke vi bezonas novajn pelilojn? Ĉu vi instalas VNDZn, pri kiu mi ordonis al vi, ke vi ne uzu ĝin?" Kaj la programisto diris: "La uzanto, kiun Vi donis al mi kiel kunulon, li diris al mi, ke mi instalu VNDZn en la komputilon, kaj mi instalas". Kaj Dio la Eternulo diris al la uzanto: "Kial vi tion faris?" Kaj la uzanto diris: "Vilĉjo tromplogis min, kaj mi instalas".

16. Kaj Dio diris al Vilĉjo: "Ĉar vi tion faris, tial vi estu malbenita inter ĉiuj datenoj kaj ĉiuj arĥivoj de la komputilo. Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la uzanto. Kaj vi ĉiam vendos VNDZn".

17. Al la uzanto Li diris: "Pro tio, kion vi faris, VNDZ seniluziigos vin, kaj li elĉerpos ĉiujn viajn rimedojn; kaj vi uzos malbonajn programojn; kaj al via programisto vi vin tiros, kaj vi lin ĉiam bezonos".

18. Kaj al la programisto Li diris: "Ĉar vi obeis la voĉon de la uzanto, kaj vi uzis VNDZn, pri kiu mi ordonis al vi, dirante, ke vi ne uzu ĝin, tial malbenita estu via komputilo pro vi; ĉiuj viaj programoj havos cimojn kaj erarojn, kaj vi devos ilin korekti ĝis la fino de la tempoj".

19. Kaj Dio la Eternulo elpelis la programiston kaj la uzanton el la DOSo, kaj Li fermis la enirpordon per pasvorto.

Trad. Marco TREVISAN HERRAZ, Italio/Hispanio

is..." – apatie respondas la edzo. "Ĉu ĝi funkciis malguste?" – "Ne, tute ĝuste..." – "Sed kio do okazis?!" – "Mi simple endormiĝis... sur la klavo "backspace"..."

\*\*\*

Leciono de la angla. La instruistino demandas: "Infanoj, kiu scias la anglan alfabeton?" La filo de la programisto respondas: "Mi scias!" – "Do diru laŭorde!" – "QWERTYUIOP..."

ŜERCE



En la reto neniu scias, ke mi estas hundo...

# Odesaj ridet☺

Olga GRIBOVAN, la odesa junulara E-klubo Verdaĵo, Ukrainio

Se veturante en mini-buso vi hazarde rimarkas skribaĵojn similajn al: “Estimataj pasaĝeroj! Manĝu sunflorsemojn kun la ŝeloj kaj bombonojn kun la volvpaperetoj” aŭ supre ĉe la elirpordo “Loko por bati per la kapo”, ne miru nek dubu – vi estas en Odeso, la urbo sur la bordo de la Nigra Maro kun riĉega historia heredaĵo kaj multnacia bunteco. Sed plej allogas Odeso pro sia reputacio kiel “humura urbo”. Pasintjare odesanoj gaje festis la 30an datrevenon de la konata Odesa *Jumorina*\* – bunta karnavalo de rido kaj bonhumoro. La ideon organizi tian feston proponis membroj de la odesa teamo de la *Klubo de Gajaj kaj Spiritaj* (eble, la plej fama televidprogramo en la tuta eks-Sovetio), kiu poste eĉ organizis la Tutmondan Klubon de Odesanoj.

La unua *Jumorina* okazis la unuan de aprilo 1973 kun la slogano “Odesano! Haltu kaj pensu: ĉu vi faris ĉion eblan por ke la urbo ekhavu la milionan loĝanton?!” Dum la kvar sekvaj festoj de humuro oni povis vidi kaj partopreni en multaj aranĝoj: “karnavala trajno”, koncertoj, konkursoj de karikaturoj,




## Sanktaj Senkulpujoj, aŭ: La unua de aprilo en decembro

Marco TREVISAN HERRAZ, Italio/Hispanio

En Hispanio la tago de ŝercoj ne estas la unua de aprilo, sed la 28a de decembro! Tiu estas la tago de la Sanktaj Senkulpujoj (hispanlingve, “Santos Inocentes” [santos inosentes]).

Tiu tago estas tago de ŝercoj kaj ridado, sed ĝia origino estas terura kaj sanga. La kristanoj diras, ke post la naskiĝo de Jesuo en Betlehemo, la reĝo Herodo estis informita de la astrologoj pri la fakto, ke ĵusnaskita infano povos fariĝi reĝo; Herodo ekpensis, ke tio estas minaco al li, kaj li ordonis, ke ĉiuj ĝis-dujaraj virseksaj infanoj estu mortigitaj. Tiuj ĉi buĉitaj infanoj estas la Sanktaj Senkulpujoj, kiujn oni rememoras la 28an de decembro.

Kutime en Hispanio en tiu ĉi tago oni kaŝe algluas paperhometon (la “inocente” [inosente]) sur la dorson de gemikoj, kunuloj,



ekspozicioj de antikvaj aŭtoj kaj humuraj fotoj. Oni povis ankaŭ mem organizi koncerton surstrate aŭ gajni premion en la konkurso de la plej ridinda ornamo de la propra balkono. Krome, dum tagoj de rido ekzistis kutimo diversmaniere malsupreniri la faman grandegan ŝtuparon de Potemkin. Kial ne



provi fari tion per skioj aŭ en malnova “ĝiba” aŭto Zaporojec?

Ekde 1976 la Odesa *Jumorina* fariĝis neim-ageble populara. Fine de marto – komence de aprilo centoj kaj miloj da gastoj ŝtopadis la stratojn de la urbo. La popolo estis tiom enorme entuziasma pri la festo, ke la urba administracio eĉ malpermesis la *Jumorina*-n. Dum dek jaroj odesanoj festis la amatan tagon kaŝe – organizante humurajn konkursojn kaj koncertojn en la lernejoj kaj gimnazioj.

La jaro 1987 estis “la jaro de la renaskiĝo”. Denove odesanoj plenigas la ĉefan straton – Deribasovskaja, surmetas karnavalajn maskojn kaj simple gajajn ornamaĵojn de la ridotago. Promenante tra la urbo dum tiu periodo (*Jumorina* jam daŭras ne unu, sed kelkajn tagojn), oni havas la okazon prezenti siajn kantajn kaj dancajn talentojn (kaj eĉ gajni premion!), poste trovi lokon, kie oni registras la plej ridigajn eldiraĵojn kaj eternigi sian brilecon. Kaj memoru – oni povas priridi vin

familianoj ktp., kaj oni ridas vidante tiujn, kiuj senkonscie havas la paperhometon. Foje ĉiuj ridas, krom vi: tio signifas, ke vi devus rigardi vian dorson! Sed tiu ne estas la sola ŝerco: la limo estas nur la imago.

Ankaŭ la amaskomunikiloj partoprenas, kaj oni diskonigas falsajn, strangajn kaj amuzajn informojn. Ekzemple, mi iam aŭdis en la televida veterprognozo, ke la satelito paneis, ĉar ĝi uzas Vindozon, sed la meteorologoj povis antaŭvidi, kia estos la vetero, ĉar la avo de la prezentisto havis kubutdoloron, kaj tio ja indikas, ke baldaŭ pluvos. Post kelkaj sekundoj mi komprenis, ke estas la 28a de decembro.

Verŝajne la tradicio pri ŝercado en tiu ĉi tago datiĝas de almenaŭ la reĝado de Filipino la Dua, kiu regis de 1556 ĝis 1598. Antaŭe estis kutimaj aliaj ŝercoj: Ekzemple bakistoj uzis salon anstataŭ sukeron por kelkaj dolĉaĵoj, kaj oni najlis monerojn al la planko. Nun tio ne plu tradicias... Sed se iam via ĵus aĉetita kuko salgustas, vi nepre informiĝu pri la dato... Vi povus esti “inocente”!

ĉiumomente. Do, ne dormu! Se vi volas gustumi la “konatan odesan dolĉaĵon” – lardo en ĉokolado – nepre vizitu la Odesan *Jumorina*-n! Des pli, ke ĉiujare la odesa E-klubo Verdaĵo okazigas humurplenan E-aranĝon.

\* de la rusa “jumor” – humuro

## Odesaj ŜERCOJ

En tramo:

- Hej, junulo, ne kuŝigu sur min!
- Ha, pri kio vi revas?

\*\*\*

En bazaro:

La vendistino: “Rigardu vi, rigardu kia belulino marŝas! Ĉarmo! Ŝiko! La feliĉo de sia edzo! Sinjorino, prenu de mi fiŝon!

- Kiom kostas tiu makrelo?
- Dekopon kontraŭ dek kopekoj.
- Kial tiom multekoste?
- Por vi multekoste?! Do, demetu la robon, vin jetu en la maron kaj fiŝkaptu mem! Ne, rigardu vi al tiu lentugplena muzelo! Kaj ŝi imagas sin belulino!

(la virino foriras, kaj la vendistino daŭrigas la vendadon)

- Fiŝoj! Senpage disdonataj! Gobiusoj!
- Bonvolu doni.
- Tri rublojn!
- Sed iu diris ja senpage?!
- Ĉu tri rubloj por tiu bonegaĵo ne estas senpage?!

\*\*\*

- Aŭskultu, kio ligas vin al Margarita?
- Kio ligas? La dua trolebuso!

\*\*\*

Sur la plaĝo: “Helpu min, mi droooooonas! Ne, ne vi, sed tiu blondulo malantaŭ vi, en blua naĝkostumo... Heelpu!”

\*\*\*

“Kelnero! Bonvolu doni al mi hartenbraungevratenŝtajngorbejstraut kun citrono”. – “Pardonu, kion vi diris? Hartenbraungevratenŝtajngorbejstraut kun kio?”

\*\*\*

“Ĉu vi hazarde ne estas filo de horloĝisto Monja?” – “Jes, estas mi, sed kial do hazarde?”

## NIA REKLAMĈO

Se averaĝa E-grupo havus la taskon vendi Koka-kolaon, mi timas, ke ĝiaj reklamiloj similus la jenan (krom esti pli longaj): “Grava bezono en la moderna mondo estas rapide havebla trinkaĵo ne ligita al iu aparta lando. Teo ne estas bona elekto, ĉar ĝi estas tro brita, tro malfacile farebla, kaj tro danĝera pro sia varmego. Ĝi ne estas regula, kaj foje gustas tro amare. En 1886 usona apotekisto elpensis tute novan trinkaĵon, kiun oni ĝis nun trinkas ĉie en la mondo. Oni povas malfermi botelon da Koka-kolao multe pli rapide, ol prepari tason da teo. Aldone, ĉar ĝi estis science kreita kaj tute nenatura, al ĝi mankas surprizoj. Ĝi estas la metra sistemo de trinkaĵoj”. KOKA-KOLAO – LA TRINKAĴO KIU FUNKCIAS!

(Gary GRADY, Usono, peris Chuck SMITH, Usono)



**Mi ne plu ŝatas vojaĝi. Flugkompanioj postulas de ni pli kaj pli da... nepostulemo. Pariza flughaveno ne volis, ke mi forflugu, sed senĉese rondiru tra ĝiaj instestoj serĉante la trovendan elirpordegon. Nurnberga aviadilejo mienis pliege gaje. Eĉ la suno kaŝrigardis tra la nuboj.**

Mi tuj sentis min iu gravulo, ĉar miaj gastigontoj venis bonvenigi min triope: Manfred kun la edzino kaj Bernhard. La antaŭo de la bela veturilego preskaŭ etendiĝis ĝis la horizonto. Ni eksagis tra maldensaj grizaj arbaretoj al Erlangen, kie mi estis gastonta ĉe Bernhard MAURER.

Laŭlonge la ŝoseon, kelkajn metrojn flanken, pasis biciklovojo. La horo fruvesperis, do iuj jam bicikladis hejmen. Rava libero! Mia biciklo dormas en la kelo, ĉar miaj ĉiutagaj veturbezonoj forte ligas min al la metroo, kaj krom tio, bicikli en Parizego estas tro streĉe.

Erlangen estas urbo fiere memstara. Samgranda urbo en Francio plene dependus de la urbeĝo kiel Nurnbergo kaj estus nur dormejo. La koro de Erlangen estas firmao Siemens [simens]. Ĉiu urbano aŭ laboras en ĝi, aŭ priservas tiujn, kiuj laboras.

Bernhard MAURER ne estas escepto. Li la tutan vivon laboris en Siemens, kaj nun estras subentrepreneton ene de la ĉefentrepreno. La tagordo de Bernhard, kiom ajn libera, estas sufiĉe streĉa. Eĉ malfruvespere, kiam litoj jam vokas siajn mastrojn, li sidadis



Fuerth

ĉe la skribotablo kaj finkalkulis ion, enkovertigis leterojn, skribis kelkliniaĵojn. Tiom laborema kaj laborkapabla, Bernhard tamen estas vivoplana gajulo. Liaj respondoj estas ĉiam rapidaj kaj spritaj. Lia rido tondras dum amikaj kunvenoj.

La amikaj kunvenoj ja oftas. En Erlangen iel aŭ tiel ĉiuj laboras kune aŭ apude. Oni najbaras, la najbareco transkreskas en amikecon, kaj la gorgo iom seka pro ridbabilado ĉiam volonte bonvenigas kruĉon da biero. Antaŭ mia alveno Bernhard konsilis al mi paŭzi de mia dieto favore al la loka biero, kiun en Sudgermanio oni tragarĝigas riverkvante. Mi sekvis lian konsilon, kaj eĉ ĉampionis tiukampe.

La tagordo por la semajno estis delonge preta. Ĝin firme krajonis Gerhard, la ĉeforganizanto de la gastiganta kvaropo en Erlangen. Lian precizemon Bernhard jam priŝercas en sia retpaĝaro, mi plene atestas ĝin.

Erwin, kiu ĉiam kuiras por la bonvenigfestoj, estas homo mirinde purkora, sed



La nurnberga murego

ĉiam malkontenta. Ĉiu frazo el lia buŝo sonas plende. Liaj amikoj estas "kapitalistoj", dum li mem estas neniam profitinta kaj neprofitema laboristo.

Nurnbergo bonvenigis min per pluvaĉo kaj ventego. Triopo da nurnberĝanoj irigis min tra la malnova urbo, ĝiaj pontetoj kaj preĝejoj. La bomboj ne kompatis la urbon dum la Dua Mondmilito, kaj granda ono de la domaro ruiniĝis. Multaj novaj konstruaĵoj tute ne beligas la intermuregan urbokoron. Tamen la konservita parto plene satigas la okulon per belaĵoj.

Nurnbergo estas konstruita el rozkolora ŝaŭmŝtono. Tiu ŝtono abundas en Armenio. Foje eĉ miŝajnis al mi, ke mi troviĝas en mia praava lando.

Oni elkore bonvenigis kaj prizorgis min ĉu en Erlangen, ĉu en Nurnbergo, tamen mi atendis alian rendezuon: tiun kun mia tre ŝatata desegnisto kaj pentristo Albrecht DUERER. Mi intencis pasigi duontagon gaste en lia hejmo-muzeo, tamen kun bedaŭro mi trovis tie malmulte da liaj verkoj. Anstataŭe plene ĝueblas la hejmetoso: vestite laŭ la portretoj, klarigistino rolis kiel la edzino de la pentristo prirakontante "sian" vivon kun DUERER. En la muzeo, en la desegnejo kaj presejeto laboras artistoj, kies duererstilaj desegnaĵoj aĉeteblas surloke.



Neĝo en Forchheim

Urbo Fuerth preskaŭ kunkreskis kun Nurnbergo. Antaŭe tie loĝis multe da judoj. El tiu urbo devenas Henry KISSINGER [henri kisinger], iama usona Ministro de Eksterlandaj Aferoj. Fuerth rozkoloras same kiel Nurnbergo. Mi dirus ke arkitekture ĝi pli harmonias ol ĉi lasta, ĉar dummilitaj bomboj preskaŭ ne surfalis ĝin. La ĉirkaŭaĵo de la urbestrejo kaj urbkonsilejo estas virge antikvaj. Ĉirkaŭiru ilin glitigante la rigardon sur

domfasadoj: ilia ŝaŭmŝtono estas kovrita per belegaj ĉizitaĵoj. Se ne estus malvarmaj pluvo kaj ventego, mi vizitus ankaŭ la judan tombejon.

Ĉiu gapvaganto elektas siagustajn vizitaĵojn. Foje min logas tute ne vidindaj loĝkvartaloj. Mi trapaŝis kelkajn el ili en ambaŭ urboj. Eĉ se ne samgrade belaspektaj, ĉiuj estis dece puraj, almenaŭ kompare al la samrangajoj en Francio, kie oni pene evitas enpaŝi ĉiean hundofekon, kaj kie la piedirvojn tapiŝas paperaĉoj.

En kelkaj kvartaloj multas enmigrintoj: plejparte turkoj, sed ankaŭ serboj, kroatoj, albanoj, italoj kaj ekssovietianoj. Iuj stratanguloj ŝajnas esti tute turklandecaj: kafejoj, kunvenejoj, vendejoj ellasas orientecajn manĝodorojn kaj muzikon. Tamen ĉie regas germanecaj deco kaj ordo.

Bamberg distancas 35 kilometrojn de Nurnbergo. Nepre vizitu ĝin ne nur pro vidindaĵoj, sed pro iom nekutima gajeco reganta en la stratoj: estas ja universitata urbo.

En Forchheim nin salutis neĝo. Ĝi belege priŝutis pintajn tegmentojn kaj eĉ promesis resti surtere ĝis la morgaŭa tago. En la urbo oni montris al mi akvomuelejon kaj du bierfarejojn. Unu estis apud la alia, do mi demandis, ĉu ili ne konkurencas. Sed klariĝis, ke iliaj bieroj estas malsamgustaj, do ĉiu havas sian preferataron.

Se vi veturas tra germanaj urboj senveturile, jen utila konsilo: aĉetu tagbileton, t.e. bileton validan dum tuta tago por ĉiuj transportiloj. La tagbileto aĉetita sabate validas ankaŭ dimanĉe! Ekzistas ankaŭ kelktagaj biletoj, sciiĝu pri la kondiĉoj. Se vi vojaĝas kelkope, eblas aĉeti kelkopan bileton, tio kostos malmulte ol po unu bileto por ĉiu. Ne hezitu kunpreni aŭ eĉ surloke pruntepreni biciklon. Fervojvagonoj kaj ofte eĉ subtertrajnoj proponas lokon por via fera ĉevaleto.



Presilo de DUERER

# Ambicia, ĝuinda, altnivele literatura

Mauro NERVI, *Italia*

**La vivo de Henriko Kvina**, *William SHAKESPEARE*. Trad. de H. TONKIN. Roterdamo: UEA. 2003. 158 paĝoj. 12,00 EUR.

Estas iom mirige, ke ĉi tiu eksterordinara dramo ne ricevis ĝis nun tradukon en Esperanton, ĉar unu el ĝiaj ĉeftemoj rilatas ĝuste la diversajn nivelojn de lingva komunikado kaj la miskomprenojn, kiuj povas fondi el tiu diverseco. Ekzemple, tuta sceno (3.4: la leciono de Katerina pri la angla lingvo) estas verkita en la franca, kio estas unikaĵo ĉe SHAKESPEARE, kaj ĝi pruvas, kiom larĝa estis kono de la franca lingvo en la ŝekspira Anglio. Sed, kiel Tonkin mem piednote rimarkas, la sursceniĝo de leciono pri la angla en dramo, en kiu la angloj milite progresas sur la franca teritorio, implicas la tezon, ke lingvoj fidele disvastiĝas paralele al la potenco de siaj parolantoj, kaj mem utilas al tiu potenco. Por ni, parolantoj de malgranda kaj nearmita lingvo, tio estas plej interesa ideologia punkto. Kontraŭ ĉiu perforta homogeneco, kiun trudas la armiloj de la ununura monda potenco, nia lilipluta lingvo povas tamen ludi la unikan rolon de senpotenca, senarmila, sed kulture pravigita reprezentanto de pluralismo kaj de lingva opozicio al la unuismaj tendencoj de la plej fortaj landoj.

Certe, tio ne estas eksplicita en la ŝekspira teksto, kvankam la lingvaj alfrontigoj, kiujn ĝi sursceniĝas, implicite prezentas tiujn sociajn tensiojn de diverslingveco, al kiuj Esperanto finfine ŝuldas sian ekziston mem. Se ni pli atente legas la dramon el ĉi tiu vidpunkto, ni povas distingi du malsamajn nivelojn: en 3.4 temas pri kontrasto de la franca kaj la angla, kio kaŭzas amuzajn miskomprenojn, kaj simile en 5.2, kie la gereĝa paro trejniĝas en la perspektivo de mikslingva geedziĝo. Sed kiam la personoj rolas je pli malalta socia nivelo, la diferenco estas ne plu inter-, sed intranacia, kvazaŭ dialektoj taŭgus pli ol naciaj lingvoj por la komikaj plebaĵoj (3.2): tiam ni renkontas la diferencojn inter Gaŭr la anglo, Fluellen la kimro, Jakobo la skoto kaj Makmoris la irlandano; ili kune militas por Henriko, sed ĉiu kverelas kun la aliaj sialingve. La du

niveloj de lingva diverseco spegulas do same distajn nivelojn de socia klaso: nacia lingvo por la solenaj, aristokrataj medioj, kaj dialekto por la drinkeja popolo; kaj Henriko, la reĝo, kies juneco pasis drinkeje en kompanio de Falstaff, ŝajnas la plej taŭga ligilo por ambaŭ. Apenaŭ dirindas, ke tiaj subtilaĵoj en la originala teksto estas preskaŭ nereprodukteblaj en traduko: TONKIN tamen heroece transprenas la taskon esperantigi vortludojn, se tio nur eblas. Brila ekzemplo sur paĝo 42, kie la komike konfuza parolo de Pistolo: “*His heart is fractured and corroborate*” fariĝas “disfrakta, lia koro rubeniĝis” kun semantika parencigo de “rubo” kaj “rubeno”. Aŭ sur paĝo 88, kie la malica rimarko de Konstablo pri la seksa aktiveco de la Kronprinco en la originalo: “*Doing is activity; and he will still be doing*” transmaliciĝas laŭ TONKIN al: “*Sed ĉu la plej efika? Nu, certe estas, ke li bonefikas...*”.

Trans la lingvo, la ideologio: kaj ni povus surpriziĝi, ke en tiom militplena dramo la baza ideologio estas paradokse kontraŭmilitisma kaj favora al humanigo de la reĝa moŝteco. Tre interesa estas ankaŭ nova ideo pri la persono de la reĝo; kvankam la monarko ankoraŭ havis (kaj devis havi) preskaŭ dian aŭtoritaton, la baroka ideologio pri la forpaseco de ĉiu gloro influas ĉi tie ankaŭ la personon de Henriko, kiu subite perceptas en si la respondecon pri tiom da homoj kaj pri ilia vivo.

En la elizabeta Anglio sinkas jam la koncepto pri reganto ĉiopova, kiu regalas sian popolon per milita potenco kaj imperiisma riĉeco; oni spertis siakoste, ke malforteco povas nestiĝi en la koro mem de la sistemo, en la reĝo, kiu estas homa, kiel ĉiuj. La eŭropa baroko inaŭguras novan manieron rigardi la povon kiel malforton, kiu trenas siajn regatojn al mizero.

Kiel jam rimarkis Paul GUBBINS en alia recenzo, la traduko de TONKIN estas ambicia: li celas konservi la *irrapidon*, “sen plilongigi la tekston por enŝovi ĉiun detalon” (p. 13). Tio havas kiel sekvon ke, ekzemple, en la laste citita versoparo pluraj ĝuindaj teksteroj perdiĝas. Cetere, la elekto de TONKIN faciligas la legadon kaj versajne ankaŭ eventualan sursceniĝon.

Oni fakte devas agnoski la multajn meritojn de ĉi tiu tonkina eldono de la ŝekspira dramo. La enkonduko estas eksterordinare altkvalita kaj informplena, donas profesiecan superrigardon pri la ŝekspira epoko,

kaj ankaŭ konsideras la filmigojn de la teksto. Aparte impresis min la filologia skrupulo, kio maloftas en la Esperantaj tradukoj: ni fakte havas ĉi tie ankaŭ skizon de la teksta historio, kaj informojn pri la versio, kiun TONKIN utiligis por la traduko. Lia tasko cetere ne estis facila, ĉar la ŝekspira lingvaĵo havas sian apartan *pezon*: kiel TONKIN mem rimarkas, *SHAKESPEARE ŝarĝas ĉiun vorton per maksimuma signifopezo, kaj parto de la efiko de liaj dramoj estas tiu procedo de mensa malnodado, kiu kvazaŭ paralelas la malnodadon de la signifo de la intrigoj. Se la fina rezulto estas neklaro aŭ ambiguo, tio estas parto de la sperto: la francaj impresionistoj ja ne uzis fotoaparatojn kaj ne celis uzi* (p. 13).

Sed ĝuste tiu intenseco de la ŝekspira teksto fariĝas dornoplena obstaklo por traduko, kiu sekvu la principojn de *irrapido* (pri kiu mi jam parolis) kaj de *ĉiutaga vortprovizo*: “*La lingvaĵoj devas vivi, kaj sekve ili devas konsisti el vivigaj elementoj. Neologismoj laŭdifine ne estas parto de la uzata lingvo. Mi celis meti en mian tradukon vortojn, kiujn mi normale uzus, do ne la inkajn kreaĵojn de ies studoĉambro*”.

Meze de tiom da groteskaj tradukoj, kie la vantemo de la tradukanto pleonasme surŝutas la amon al la originalo, la tonkina modesto (“poeto mi ne estas, nek pretendas esti”) ŝajnas des pli simpatia; kaj cetere estas konate, ke DANTE mem havis la saman principon (kiel modelon por la *Komedio* li siadire uzis la simplan lingvaĵon de la popolaninoj). Fakte seriozaj literaturistoj scias, ke ne ekzistas *aparta* literatura lingvaĵo: ne la unuopaj vortoj/neologismoj difinas literaturon, sed la kunplektiĝo de iliaj semantikaj, fonetikaj kaj ideologiaj valoroj. Por redoni tiun reton, tradukisto devas antaŭ ĉio havi emocian rilaton al sia teksto; tio implicas ankaŭ modeston, admiron al la grandaj verkistoj, kiujn ni volas kiel eble plej rekte kaj fidele prezenti al alilingva publiko. TONKIN apartenas al ĉi tiu klaso de tradukistoj, kiuj profesie kaj ĝuoplene redonas sian tekston, kaj ne emas pirueti per lingvotordaj kaprioloj.

Cetere, en multaj punktoj la amo al la teksto fariĝas, en TONKIN, inspiro al poeziple-na Esperanto. Kaj li ne hezitas konfesi – eĉ iel fiere – ke cele al poluro li profitis la helpon de du el niaj plej elstaraj poetoj: Baldur RAGNARSSON kaj Marjorie BOULTON. La proksimeco de tiaj homoj, kaj la implicita, poeziiga ombrego de SHAKESPEARE, certe inspiris TONKIN al laboro, kiun oni vere povas difini altnivele literatura, kaj ekzemplo vojmontra por nia tradukarto.



## FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

### fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

## Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: *Koresponda Servo Mondskala*, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

<[www.esperantomondo.net](http://www.esperantomondo.net)> - TTT-ejon por konatigi homojn, kiuj serĉas korespondantojn de la tuta mondo!

ANONCE

## JUNA AMIKO - internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 4-foje jare (marto, junio, septembro, decembro) sur 28 plenkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

*modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesajoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkultura, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.*

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <[www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu)>

## Kiel sendi kontribuojn al KONTAKTO?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodigon por supersignaj literoj); bildojn - kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la Interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

## Kotiztabelo de UEA por 2004

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/eŭro	4	10	25	15	9	50
Aŭstralio/dolaro	14	36	89	53	32	178
Aŭstrio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Belgio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Brazilo/eŭro	4	10	25	15	9	50
Britio/pundo	5	13	32	20	12	64
Bulgario/eŭro	4	10	25	15	9	50
Ĉeĥio/krono	175	440	1100	660	395	2200
Danio/krono	60	150	370	235	140	740
Finnlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Francio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Germanio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hungario/forinto	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Irlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Islando/eŭro	8	20	50	30	18	100
Israelo/eŭro	6	16	40	24	14	80
Italio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Japanio/eno	900	2200	5500	3300	2000	11000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/eŭro	4	10	25	15	9	50
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	4	10	25	15	9	50
Slovakio/krono	200	500	1250	750	450	2500
Svedio/krono	80	190	480	310	185	960
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Ukrainio/eŭro	4	10	25	15	9	50
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFO A/eŭro	5	13	33	20	12	66
TARIFO B/eŭro	4	10	25	15	9	50

**ALIAJ LANDOJ:** Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

**TARIFO A:** Honkongo, Korea Respubliko, Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

**TARIFO B:** Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Mallongigoj:

**MG** - Membro kun Gvidlibro

**MJ** - Membro kun Jarlibro

**MJT** - MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

**MA** - Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

**MA-T** - MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

**SA** - Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

**Kto** - Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

**SZ** - Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membrokotizo)

**PT** - Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO tutmonde*)

**DM** - Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

**DMJ** - Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

**Kiel individuaj membroj de TEJO** (MJ-T aŭ MA-T) por 2003 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2003 (t. e. kiuj naskiĝis en 1973 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

**Eblas aboni** ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

**Oni povas pagi** pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

**KONTAKTO:** Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 200** (2004:2), 41a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☐ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, p/k 89, UA-01030, Kievo-30 Ukrainio; ret-adreso: <[kontaktotejo.org](mailto:kontaktotejo.org)>. **Redaktoro:** Eugenia ZVEREVA (Ukrainio). **Vic-redaktoro:** Joel AMIS (Usono/Nederlando). **Cef-korektisto:** Pavel MOJAJEV (Ukrainio) **La kovrilfoto:** Ziko Marcus SIKOSEK (Germanio/Nederlando). **Bildoj (p.3-4):** Stano Marcek, Slovakio. **Ceteraj bildoj:** Sergej TIMČENKO. **Komposto:** Eugenia ZVEREVA. **Presado:** SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <[skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl)>. **Abontantaj kunlaborantoj:** Joel AMIS (Usono), Giancarlo BARALDI (Italio), Alex KADAR (Francio), Morteza MIRBAGHIAN (Irano), OSHO DAVIES Oluwabunmi (Niĝerio), SALIKO, (Finnlando), Behrouz SOROUSHIAN (Irano/Francio), ZHANG Xuesong (Ĉinio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujara. **Anonctarifo:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Vartantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <[http://roi.orf.at/esperanto/es\\_demand.html](http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html)> (laŭ mendo tra la servo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio:* elsendoj:13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F - 6 - Hot Bird - 13 gradoj de la orienta latitudo; frekenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>>, <[http://www.radio.com.pl/poloniam/esperanto\\_eo.asp](http://www.radio.com.pl/poloniam/esperanto_eo.asp)>, <<http://start.at/retradio>> **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinio de unuopaj aŭtoroj.**

# Fotokonkurso en *Kontakto!*

Per tiu ĉi numero *KONTAKTO* lanĉas fotokonkurson. Por komenco mi elektis la foton de konstanta *KONTAKTO*-leganto – Sergej PAĤOMOV (Rusio) kaj ankaŭ kelkajn miajn fotojn. En la venontaj numeroj mi tre volas vidi jam VIAJN fotojn (se vi volas post publikigo ricevi ilin reen, bv. indiki tion). Bv. sendi la fotojn al la redakcio: Ĵenja ZVEREVA, p.k. 89, UA-01030, Kiev-30, Ukrainio, aŭ <[kontakto@tejo.org](mailto:kontakto@tejo.org)> (en jpg-formato, 300 dpi). La gajnintoj ricevos valorajn premiojn kaj senpagan abonon de *KONTAKTO!*

